


novembro 1972

65-a jaro

n-ro 803 (11)

esperanto

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



AL BEOGRADO

Vi trovos

en tiu ĉi numero, ekde la ĉefartikolo de nia plej fekunda eldonisto prof. Juan Régulo Pérez, ĝis la ampleksa recenz-rubriko, aparte literaturan akcenton. Kvankam tia deklaro, kiel tiu de la poeto Karolo Piĉ, ke “la Esperanta literaturo, nur la literaturo, fakte kaj vere estas Esperanto”, ne plu validas laŭvorte en epoko, kiam la socia kaj parola bazo de la Internacia Lingvo tiel vastiĝis kaj fortikiĝis, — tamen neniuj povas nei, ke sen la amo de niaj verkistoj, eldonistoj kaj legantoj al la libro-kulturo de Esperanto la lingvo kiel socia fenomeno apenaŭ povus ekzisti kaj flori hodiaŭ. Kaj, same kiel en ĉiu amo, oni volonte permesas iom da poezia troigo en la esprimo . . .

En la lastaj monatoj de la Internacia Libro-Jaro ni do omaĝu kaj subtenu ĉiujn verkistojn kaj eldonistojn, kiuj kontribuas al la bunta mozaiko de la Esperanta literaturo.

Pri alia mozaiko temas la raportoj pri Kanado sur la paĝoj 183 kaj sekvantaj: la mozaiko de la naciaj kulturoj en unu el la plej grandaj landoj de la Nova Mondo. Kiam antaŭ nelonge ni aperigis artikolojn kontraŭ la superrega pozicio de la angla lingvo en la internacia vivo, venis kelkaj protestoj de legantoj, kiuj opiniis, ke ni atakas la anglan lingvon mem! Responde ni atentigis, ke same necesus kontesti la pozicion de ĉiu ajn nacia lingvo, kiu arogas al si la rolon de neŭtrala lingvo internacia; krome, ke la artikolojn verkis mem anglalingvanoj! Traktante denove la problemojn de naciaj lingvoj — ĉi-foje en Kanado — ni eble atentigu anticipe, ke ambaŭ artikolojn verkis kanadanoj . . .

Enhavo

- 181 Presinka medito (Régulo)
- 182 Kolektivaj “Amikoj de Esperanto”: Konkreta rezulto de enketo en Jugoslavio
- 182 Lingva problemoj ankaŭ inter komputiloj
- 183 Dulingvismo kaj diskriminacio en Kanado (Kaneen)
- 184 Kultura mozaiko Ontario (Eichholz)
- 186 La legendo (Szabó)
- 188 Al la maro (Ueyama)
- 189 Sankta Francisko kaj la povraj judoj (traduko de Balbin)
- 189 Belartaj Konkursoj por 1973
- 190 Recenzoj
- 192 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj)
- 194 Loke — Fake (mallongaj novaĵoj)
- 194 Nekrologo: Pumpur
- 195 Al Beogrado: 58a Universala Kongreso en 1973
- 196 TEJO-paĝo
- 197 Komenco bona — ĉio bona
- 198 Historio kaj nuntempo (Woessink)
- 198 Esperanto en radio
- 199 Oficiala informilo: n-ro 461
- 200 Kalendaro; turisma kalendaro preparata
- 200 Anoncetoj

La kovrilo

Sur roka monteto en Beograd (kongresurbo de UEA por 1973), kun superrigardo de la kunfluejo de la riveroj Danubo kaj Sava, jen la parko Kalemegdan, kun antikva fortikaĵo kaj la monumento “La venkinto” de la konata skulptisto Ivan Meštrović.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910).

Ĉefredaktoro: V. Sadler.

Redaktoro: A. Woessink-Nagata.

Inkluzivas la organon de TEJO “La Juna Vivo” (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Meza Afriko, Norda kaj Meza Ameriko 8,25; Mezoriento, Nordafriko 5,50 gld.

Anonc-tarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-Singel 93, Rotterdam, Nederlando.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Kompostita kaj fotografita en la Centra Oficejo de UEA.

Presita ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel en Hardinxveld, Nederlando.

Legantoj en 88 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado kaj komercaj kaj industriaj rilatoj: E.L.M. Wensing, Postbus 72, Valkenswaard NB, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S- 692 02 Kumla 2, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.Germanujo.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, F.R.Germanujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, Warszawa-12, Poŝtkesto 100, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 17 Ashbourne Terrace, London SW19 1QX, Britujo.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp (Gld.), Nederlando.



PRESINKA MEDITO

Dum mi sidas kontraŭ tajpilo por kunfliki ĉi tiun artikoleon, ŝvebas en mia kapo kelkaj faktoj el la biografio de Pío Baroja, kies libron *La arbo de la sciado* mi nun presas kaj al kiu mi ĵus verkis enkondukon. Unu el tiuj faktoj estas la trovaĵo de la esploristoj, ke la unuaj mil ekzempleroj de ĉiu el liaj unuaj tridek romanoj postulis tridek jarojn por elvendiĝo. Se mi konsideras, ke Baroja estas, post Balzac kaj Pérez Galdós, la plej fekunda romanisto de ĉiuj epokoj, kaj nepre unu el la mondaj romanpintoj, plenrajte amblanta apud la du cititaj, kaj se mi komparas la disiran ritmon de liaj unuaj libroj kun tiu de la aperintaj sub la marko Stafeto (plejparte eldonitaj nur mil-ekzemplere), mi trovas, ke en mia eldonagado apenaŭ estas objektivaj plendmotivoj: dekduo da titoloj jam elĉerpiĝis, el kiuj la lastaj aperis nur antaŭ dek jaroj. (La ĵusaj reeldonoj de pluraj el tiuj unuaj romanoj de Baroja disvendiĝis po centkelke da miloj, unu eĉ super kvincent mil!)

Nu, ĉar, kiel estas ĉie konate, Esperanto naskiĝis ĝuste per libro, modeste eldonita en Varsovio en 1887, kaj vivis siajn ĝisdatajn okdek kvin jarojn ĉefe dank'al libroj, kaj sur ili, mi volas iomete babili kun vi, okaze de la Internacia Libro-Jaro dekretita de Unesko, pri novaj titoloj nun kovataj sub la emblemo Stafeto kaj mia kompreno pri la gravo kaj rolo de la Esperanta literaturo.

Sed, antaŭe, mi volas aldoni pripenson, nome, ke plej probable la Esperanto-movado estas senparalela, en la monda kulturhistorio, rilate sian libro-dependecon. Ĝi ja startis kiel literatura ago — kaj tio denaske signis ĝian vivon, ĉar ja ĉiu komenco estas direkto-dona por la cetero de onia ekzisto. Tial libroj havas en Esperanto ian mistikan signifon, kiun oni neniel povas trovi ĉe etnaj kulturoj, ĉar tie, dum longaj jarcentoj, unue kaj ĉefe estis la viva vorto, kaj ne la presita, kiel en Esperanto. El tio sekvas, ke Esperanto estas fundamente literatura fakto, kaj ke ĝi absolute ne ekzistus sen literaturo.

Ĝuste tial, ke tiu pripenso pri la fundamenta gravo de nia literaturo konstante ĉirkaŭŝvebis mian esperantistan vivon, kiam mi elpaŝis kiel eldonisto en la Lingvo Internacia, mi ĉiam preferis kunhelpi lanĉon de libroj originale verkitaj en Esperanto. Kvankam per tio, notu bone, mi neniel pretendas subtaksi la gravon de tradukoj por la evoluado de nia lingvo, ĉefe kiam ili kontribuas proprigi en Esperanton esprimajn atingojn de evoluintaj verklingvoj.

En konekso kun la jam aludita Internacia Libro-jaro, la redaktorino de la revuo "Esperanto" invitis min verki artikolon, kiu iel odoru je freŝa presinko. Nu, dum la lastaj monatoj preskaŭ ĉiutage tiklis mian

nazon presinka freŝo de kvin novaj titoloj (du el kiuj jam estas presitaj, sed ankoraŭ ne eldonitaj), nome:

1. . . . *kun siaspeca spico!* de Raymond Schwartz, originalaj pecoj, kiuj tra vortoĵonglaĵoj evoluigas al literaturaj faktoj multajn el niaj lingvaj latentaj faktoj;
2. *Ni kaj ĝi* de Gaston Waringhien, tria volumo de liaj akraj eseoj, nun pri magio, religio kaj arto;
3. *La arbo de la sciado* de Pío Baroja, elhispanigita de Fernando de Diego, probable la plej tipe hispana romano de la nuna jarcento;
4. *La luzidoj* de Luís de Camões, elportugaligita de Leopoldo H. Knoedt, volumo de la serio Oriento-Okcidento;
- kaj 5. *Vojo kaj vorto* de R. P. Nogueira, debuta libro de nova talento, kiu jam indiĝeniĝis en Esperantujo. Prespretaj estas pliaj dek titoloj, el kiuj almenaŭ okon mi esperas lanĉi en la periodo 1972-1973, lige kun la 20-jara ekzisto de la libroserioj sub la sigelo Stafeto.

Esperanto — fundamente literatura fakto

Antaŭ ĉ. tri mil jaroj, el etaj ĝermoj, el humilaj komencoj naskiĝis tiu fenomeno, kiun la kulturhistorio nomas la helena miraklo. Ĝis tia grado, ke fama sociologo, H. Sumner Maine asertis, ke ĉio, kio nun moviĝas en la mondo, escepte de la blindaj fortoj de la naturo, estas helena en sia origino. Nu, mia firma konvinko estas, ke tiu fenomeno, kiun ni nomas Esperanto, kun sia kultura fono bele prilumita de Auld en la revuo "Esperanto" (januaro 1970) — tiu fenomeno, tute nova en la mondhistorio, nun ete ĝermanta, humile ekkreskanta, havas promesplenan estonton, kiu nin ĉiujn loge antaŭenigas sub la ĥlamido* de la Espero. Restas al ni nur pacience, senhalte, monaĥe persistadi, senĉese konstruadi, entuziasme, fidele.

En konekso do kun la supra konstato, ke Esperanto estas fundamente literatura fakto, mi strebas aldonadi brikon al briko, por la kunmasonado, plifirmigo de nia kultura bazo. Mi estas konvinkita, ke kvanto liveras kvaliton, kiel pruvas la olimpikoj: landoj, kiuj kvante, amase vartas sportistojn, liveras plej valorajn kvalitojn. En tiu konvinko pri la pravo de nia literatura vastigado, vestite per la ĥitono** de la esperantistoj, mi volas fini per alineo pruntita el libro de Karolo Piĉ, kiun mi eldonos en 1973:

"Iasence Esperanto ne ekzistas. Ĉar, kio estas Esperanto? Ĉu gramatiko? Ĉu vortaro? Ĉu izolaj lingvo-elementoj? Ne! Ĝi estas literaturo! Kaj tial la *Esperanta literaturo*, nur la literaturo, fakte kaj vere estas Esperanto!"

* ĥlamido: helena mantelo. (Red.)

** ĥitono: helena tuniko. (Red.)

KOLEKTIVAJ "AMIKOJ DE ESPERANTO"

Konkrete rezultoj de enketo en Jugoslavio

Slovenia Esperanto-Ligo kaj Esperanto-Instituto por Slovenio (Jugoslavio) entreprenis enketon por sondi ĉe komunumaj instancoj kaj organizaĵoj, kia estas ĝenerale la interesiĝo pri Esperanto. La enketo okazis en ĉiuj 60 komunumoj en Slovenujo.

La demandoj en la enketo estis jenaj: 1) Ĉu vi subtenas la intencon de slovena televido prezenti en sia programo ankaŭ kurson de la Internacia Lingvo Esperanto? 2) Ĉu vi deziras, ke la radio kaj televido almenaŭ unufoje monate preparu informojn pri la enlanda kaj tutmonda Esperanto-movadoj? 3) Ĉu vi deziras, ke ankaŭ en ĵurnaloj aperu informoj pri la Esperanto-movado? 4) Ĉu vi subtenas la intencon pri ĉiam pli larĝa instruado de la Internacia Lingvo Esperanto en lernejoj?

Krome oni aldonis al la enketo inviton al unuopuloj kaj organizaĵoj aliĝi al la movado kiel "amiko de

Esperanto" kaj pagi difinitan sumon kiel kontribuon por realigo de la prienketita programo.

La rezultoj de la enketo surprizis la enketintojn. Ĉiuj 60 komunumestroj subtenas ĉiujn 4 enketprogramojn. 44 komunumoj fariĝis kolektivaj "amikoj de Esperanto". En la enketitaj komunumoj, 383 elementaj kaj 161 mezaj kaj superaj lernejoj akceptis la enketan programon pozitive, kaj 378 elementaj kaj 121 mezaj kaj altaj lernejoj fariĝis "amikoj". Por plue konfirmi ilian konscian subtenon en la nuna momento el 40 komunumoj aliĝis al speciala koresponda kurso por instruistoj 435 pedagogoj, kiuj je lernejaj kostoj ellernos Esperanton por poste instrui ĝin en sia lernejo.

Kvankam la respubliko Slovenujo okupas nur 7,9% de la areo kaj 8,4% de la federacia popularto de Jugoslavio, la sekvoj de ĉi tiu enketo povus tutlande evolui sur la tereno jam fekunda pro tiea plurlingveco.

LINGVA PROBLEMO ANKAŬ INTER KOMPUTILOJ

Dekstre s-ro H. Hunt, vicprezidanto de SEAS.
Kunsidas ankaŭ s-ro C. Aarts kaj d-ro F. Hertwerk.



Jam de longe la demando pri programaj lingvoj kaŭzas disputojn inter IBM kaj SEAS, kiu estas la organizaĵo de la uzantoj de pli grandaj IBM-komputiloj. Pli frue IBM provis anstataŭigi la tri kodlingvojn Cobol, Algol kaj Fortran per unu universala lingvo PL/1*, kiu postulas pli da memora spaco kaj sekve estas malpli oportuna por difinitaj specifaj problemoj. La uzado de unu sola lingvo plisimpligus la evoluon de la entrepreno, sed la eŭropaj uzantoj, jam alkutimiĝintaj al la aliaj kodlingvoj, obstine kontraŭis tion. Hodiaŭ ĉiuj kvar lingvoj estas paralele uzataj.

"Kiel estos en la estonteco, ankoraŭ estas necerta afero. Persone mi supozas, ke ni uzos tute novan lingvon", diras s-ro Harry Hunt, vicprezidanto de SEAS. En tiu organizaĵo oni inter la du ĉiujaraj konferencoj laboras en konstantaj agadgrupoj pri aferoj rilate i.a. la menciitajn programlingvojn.

(El intervjuo, kiun faris *Handelstidningen* en Gotenburgo okaze de aŭtuna konferenco (1972) kun 300 partoprenantoj el diversaj landoj. Intervjuito estis s-ro Harry Hunt, Laboratorio pri Altenergio. Partoprenis i.a. la sekretario de SEAS, s-ro Christianus Aarts, Universitato de Nijmegen, Nederlando, kaj la estrarano, d-ro Friedrich Hertwerk, Universitato de Max Planck, F.R. Germanujo.)

INTER-grupo, Gotenburgo

* Temas pri kodoj konsistantaj el unuopaj vortoj kaj silaboj, kiuj respondas al diversaj instrukcioj kaj kiuj faciligas al la homo la interrilaton kun la komputilo. La maŝino tradukas la kodvortojn en duelementajn ciferojn, kiujn ĝi kapablas mem prilabori. Da tiaj kodlingvoj ekzistas nuntempe ĉ. 120, el kiuj Cobol, Algol kaj Fortran estas la plej konataj. (Red.)

DULINGVISMO KAJ DISKRIMINACIO EN KANADO

BRIAN D. KANEEN

Adjunka profesoro
Departemento de Modernaj Lingvoj
Universitato Simon Fraser, Kanado

Dulingva
(franca/angla)
trafik-indiko
en la urbo
Kebeko
(Kanado)

Tio, kio unuavide ŝajnas esti relative simpla dupolusa lingva situacio en Kanado, fakte estas ege kompleksa afero. Streĉiteco inter angle- kaj france-parolantoj ĉiam denove estas sentebla tra la mallonga historio de nia lando, kaj multaj nun samopinias kiel la ŝtatsekretario Gérard Pelletier: "Estas afero de simpla justeco, meti ambaŭ oficialajn lingvojn en Kanado sur la saman bazon. Sed estas ankaŭ afero de vivo aŭ morto por Kanado, se ĝi volas pluvi kiel politika tutaĵo, disigita de Usono. La ekzisto de francaj lingvo kaj kulturo ene de niaj landlimoj tutklare konsistigas la plej originalan elementon de kanadeco." (1969)

La 30-an de oktobro ĉi-jare okazos nacia elekto kaj jam ŝajnas esti sufiĉe certe, ke la Liberala Partio, kun ĉefministro Pierre Trudeau, estos reelektita. Oni esperis, ke la lingva afero ne fariĝos ĉefa temo dum la kampanjo, kaj fakte tiel estas. Montriĝis tamen, ke estas ĝenerala malkontenteco pri la maniero, laŭ kiu oni efektivas la 1969ajaran Akton pri Oficialaj Lingvoj. Kvankam ĉiuj tri grandaj partioj akceptas ĝin principe, multaj personoj opinias, ke ĝi celas fari tro multe kaj tro rapide, dum aliaj tute male opinias.

Iom da historio

Ĝis la jaro 1759, kiam la brita generalo Wolfe venkis la francan generalon Montcalm en batalo sur la Ebenaĵoj de Abrahamo apud Kebeko, preskaŭ ĉiuj esploristoj, komercistoj kaj koloniantoj estis de franca deveno. Por gajni terenon por si, ili devis lukti kontraŭ la indianaj praloĝantoj. Poste komencis alveni koloniantoj el Britujo kaj Usono, tiel ke en 1791 oni dividis la landon en Superan Kanadon (kun ĉ. 20 000 angleparolantoj) kaj Malsuperan Kanadon (kun ĉ. 100 000 francoj kaj 10 000 britoj) — el kio lasta rezultis la angla malplimulto en Kebeko.

Post 1815 venadis novaj koloniantoj, ĉefe el Anglujo sed poste ankaŭ el Irlando, Skotlando, Germanujo, Nederlando kaj Usono. En 1867 establiĝis la Dominio de Kanado kun propra parlamento. Ĉirkaŭ 1900 tiu alflueto de enmigrintoj fariĝis vera inundo; ili venis ĉefe el Britujo, Germanujo, Skandinavujo, la Balkanaj landoj, Ukrainujo, Rusujo kaj Usono. La plimulto tamen ekloĝis en Ontario, sur la prerioj*, aŭ

* Prerio = unu el la vastaj ebenaĵoj de Nord-Ameriko, iam sovaĝaj, nun dediĉitaj al kultivado. (Red.)



ĉe la Pacifika marbordo. Dum periodo de 15 jaroj alvenis ĉirkaŭ du milionoj da personoj. Pro ĉi tiu mozaiko de malsamdevenaj personoj, multaj kanadanoj de la mezo kaj de la okcidento nun disputas, ĉu tiu teorio pri nur "du fondintaj gentoj" ankoraŭ validas. Laŭ ili la francoj estas nur unu plia grupo inter multaj.

.... kaj da geografio kaj statistiko

Kanado estas geografie la dua plej granda lando de la terglobo, sed havas nur 21 569 000 enloĝantojn (1971), el kiuj la plimulto loĝas sur mallarĝa terstrio apud la usona landlimo. Laŭ la statistiko de la popolnombrado en 1971 denaskaj parolantoj de diversaj lingvoj estas jene:

1. angla	12 973 810 = 60,2%
2. franca	5 793 650 = 26,9%
3. germana	561 085 (0,5% malpli ol en 1961)
4. itala	538 360 (59% pli ol en 1961)
5. ukraina	309 855 (14% malpli ol en 1961)

Pro tio, ke la granda plimulto de la franceparolantoj loĝas en Kebeko, multaj prerianoj kaj aliaj okcidentanoj, kiuj preskaŭ neniam aŭdas aŭ aŭdis eĉ unu francan vorton, nur kun granda malfacileco povas kompreni, kial la federacia registaro en Otavo tiom okupiĝas pri la franca. Ekzemple en Brita Kolumbio parolas nur 1,7% denaske la francan, dum jam 15,5% parolas aliajn lingvojn, unue la germanan.

La lando estas administre dividita en dek provincoj, kun centra federacia registaro en Otavo. Povas esti, ke disigo laŭ ekonomiaj regionoj estus pli logika, kaj oni fakte ja jam plurfoje proponis ĉi tian regionismon. En la okcidento juna partio (Partio de Okcidenta Kanado) lastatempe rapide kreskis, kaj celas kontraŭstari la pezon kaj de Otavo kaj de la oriento. Ĉi tiu partio kompreneble opinias, ke dulingvismo estas tute sensenca por okcidentanoj.

Multaj kebekanoj estas konvinkitaj, ke ilia provinco

Dulingvismo kaj diskriminacio en Kanado

(daŭrigo de p. 183)

ne estas provinco samsence kiel ĉiuj aliaj. Ĝi estas la franckanada patrujo, kaj nur tie ili sentas sin hejme, dum anglaj kanadanoj libere vagas de unu provinco al alia, kaj ĉie estas por ili same hejmo.

Preskaŭ ĉiam oni sentas la proksimecon de Usono, kaj geografiaj baroj, aŭ ties manko, signifas, ke kelkfoje kontakto inter nordo kaj sudo estas almenaŭ tiel grava kiel kontakto inter okcidento kaj oriento. Usono estis historie granda fandujo, kie ĉiu novalveninto lernu la ununuran nacian lingvon, la anglan. Tiel opinias ankaŭ pri Kanado kelkaj prerianoj. La nacia registaro en Kanado nun faras klopodojn, por ke tiu bunta, kultura heredaĵo nia ne perdiĝu, sed ankoraŭ ne estas klare, kiomgrade ili klopodas konservi ankaŭ la lingvojn de la etnaj malplimultoj.

* * *

Por reveni nun al la Akto pri Oficialaj Lingvoj — ĉi tiu Akto rekonas oficiale la lingvojn de la du unuaj fondintaj etnoj (sen paroli pri la indiĝenaj indianoj aŭ eskimoj!) kaj difinas la rajton, ke ambaŭ povu trakti kun la federacia registaro en sia propra lingvo ĉie, kie tiu malplimulto konsistigas pli ol 10% de la loĝantaro. Por tion efektivigi necesas, ke la federacia registaro pligrandigu la dulingvan kapablon de la ŝtataj funkciuloj.

Ĝis nun "dulingva" preskaŭ ĉiam samsignifas kiel "franckanada". Eĉ en Otavo ekzemple nur 18% de la ŝtatfunkciuloj estas francaj. Apenaŭ sukcesaj estas registaraj kursoj por instigi la anglojn al eklernado de la franca. Pro tio, ke edukado estas provinca kaj ne federacia respondeco, oni ne povas serĉi estontan solvon ĉe la lernejoj kaj universitatoj. En Brita Kolumbio studento povas diplomigi ĉe universitato sen iam ajn esti devigita lerni eĉ unu vorton de iu alia lingvo, kvankam la plimulto jam havis unu/dujaran kontakton kun la franca. Imagu al vi la rezultojn!

Unulingvaj anglaj ŝtatfunkciuloj (unulingvaj francaj efektive preskaŭ ne ekzistas!) ektimas nun pri la postenoj kaj ankaŭ, ke ĉiuj ŝtataj funkcioj baldaŭ estos tiel dire "francigitaj".

Diskriminacio

Kontraŭfranca diskriminacio estas kaj estis ne nur lingva. Studo en 1967 montris jenajn mezajn salajrojn de personoj kompletigintaj almenaŭ unu jaron en universitato: 1. anglalingvano — \$8 023; 2. alilingvano — \$7 059; 3. franclingvano — \$6 295. Ĉi tian diskriminacion oni trovas ne nur en angla Kanado, sed ankaŭ en Kebeko mem, kie multaj superuloj estas anglaj — pro ĉi ĉio la sloganoj de antaŭ kelkaj jaroj "*Maîtres chez nous*" kaj "*Au Québec tout en français*" ("Ni estu la propraj mastroj" kaj "En Kebeko ĉio en la franca").

Siavice la angla malplimulto en Kebeko sentas sin minacata, sed tio estas ja kvazaŭ alia temo, kiun prefere traktu unu el miaj orientaj samlandanoj.

Sume, kiel deklaris la ĉefministro Trudeau pasintan

julion: "Ĉi tiu lando devas fariĝi dulingva antaŭ certa dato; alie franceparolantaj kanadanoj ne plu volos atendi". Estas certe, ke multaj kebekanoj jam nun ne plu interesiĝas pri alĵetitaj lingvaj paneroj. Kiel asertis la Komisiito pri Lingvoj Keith Spicer (oficiale nomita rajtprotektanto): "Por granda parto de niaj francparolantaj samlandanoj la Akto pri Oficialaj Lingvoj estas fakte impertinenta farso. Ĝi venis 100 jarojn tro malfrue por 24% de la kebeka elekt-



KULTURA

De la 2a ĝis 4a de junio okazis en Toronto kongreso *Heritage Ontario* ("Kultura Mozaiko Ontario") aranĝita de la provinca registaro de Ontario por provizi publikan forumon por ĉiuj "etnaj" grupoj, kiuj konsistigas la kanadan socion, por ke ili povu esprimi siajn ideojn pri tio, kiaspecan socion ili deziras en Ontario. Mi devas klarigi, ke la vorto "etna" havas tute apartan signifon en kanada lingvouzo, nome: apartenanta al aŭ devenanta de popolo, kies lingvo estas nek la angla nek la franca. Se oni parolas en Kanado pri "etnaj lingvoj", tio do estas ne nur la indiĝenaj indianaj kaj eskimaj lingvoj, sed ankaŭ la lingvoj de tiuj enmigrintoj, kiuj ankoraŭ konservas siajn proprajn lingvojn kaj kulturojn kaj kiuj ne perdas siajn karakterizajn trajtojn fariĝinte nur angla- aŭ franclingvuloj.

La malfacilaĵoj, kiujn la tutkanada registaro nun havas kun la france parolantaj kanadanoj — ekzistas kreskanta partio, kiu alcelas sendependan kaj nur franclingvan Kebekon — kaj ankaŭ la ekkono, ke la etnaj grupoj pli kaj pli konsciiĝis pri la ekzistanta lingva diskriminacio kaj ke ili postulas samajn rajtojn por la propraj lingvoj, puŝis la provincan registaron al progresema ekpaŝo kaj organizo de tiu kongreso, antaŭ ol la jam antaŭvideblaj ekflamiĝontaj pasioj faros intertraktadon malfacila.


Leginte pri la okazonta kongreso, mi skribis al ĝia organizanto, John Yaremko, provinca sekretario kaj ministro pri civitaneco, kaj petis, ke mia edzino kaj mi estu invititaj al la kongreso por paroli tie por Esperanto, kaj ni kunsendis kelkajn informilojn.

antaro". Per tiu cifero li celis tiujn, kiuj balotis por la apartisma *Parti Québécois* okaze de la lasta provinca elekto.

Starigo de efika dulingva ŝtatfunkciularo kompreneble ne solvos la problemojn de Kebeko ene de Kanado, sed ties manko sen iu ajn dubo grave pliseriigos la situacion.

1972 10 15

Brian Kaneen, Kanado



(Ŝtatoficistoj lernas la francan lingvon en Lingva Laboratorio Otavo.)

MOZAIKO ONTARIO

RÜDIGER
EICHHOLZ

Kelkajn semajnojn poste ni ricevis personan leteron de la ministro, en kiu li skribis, ke la atingoj de Esperanto impresis lin kaj ke niaj kontribuoj kun informoj pri tiu lingvo "pligrandigos la dimensiojn de niaj diskutoj". Ni ricevis la invitilojn kaj povis partopreni la kongreson.

Kvar vidpunktoj

Post la malfermaj ceremonioj, dum kiuj i.a. gejunuloj el la plej diversaj kulturaj grupoj prezentis kantojn kaj dancojn por demonstri la diversecon de la kulturoj kune vivantaj en nia provinco, kaj post prezento de "Kvar Vidpunktoj" fare de kvar reprezentantoj, ĉiu parolanta por unu el la kvar grupoj: por la indianoj kaj eskimoj, por la anglalingvanoj, por la francalingvanoj kaj fine por la "tria grupo" por la "etnaj enmigrintoj", okazis en 15 diversaj laborgrupoj diskutoj pri kvin temaroj: A Civitaneco, B Kulturo, C Edukado-lingvo, Ĉ Homaj Rajtoj — amaskomunikiloj, D Registaro. Ni elektis tiujn laborgrupojn, kies temoj plej taŭgus por mencii nian lingvon, ekz. la temojn "La enmigrinto — ĉu lia kulturo estas konservinda aŭ forĵetinda?", "Unueco per diverseco aŭ homogeno socio?" (en kadro de la temaro A Civitaneco).

Ni rajtis paroli, sed nia tempo estis severe limigita, kaj ni nur tre mallonge povis skizi niajn proponojn, nome ke

1. Oni eksperimente instruu dum unu jaro en kelkaj klasoj de la 7-a lerneja jaro nian lingvon anstataŭ la parolan francan kaj ke oni poste komparu la rezult-

ojn atingitajn. Ni atentigis, ke infanoj, kiuj lernis Esperanton anstataŭ la parolan francan lingvon dum unu jaro, estos eĉ dum la posta lernado de la franca lingvo pli sukcesaj, laŭ eksperimentoj faritaj en Britujo.

2. La registaro simbole uzu nian lingvon, por tiel indiki al la minoritataj grupoj, ke ĝi ne volas subpremi aŭ asimili ilin. Oni ekz. permesu la kantadon de nia nacia himno ankaŭ en Esperanto.

Niaj proponoj estis neniam antaŭe aŭditaj de la kongresanoj, kiuj ĉiuj provis atingi pliajn rajtojn por la propraj grupoj. La ideo, ke Esperanto povus esti utila al tiu celo, estis tute nova al ili. La plej multaj nenion sciis pri nia lingvo, aŭ ili havis la kutimajn antaŭjuĝojn, ke nia lingvo jam mortis, ke ĝi ne havas 'animon', kulturon ktp. Pro la parolemo de la partoprenantoj en la laborrondoj ni bedaŭrinde ne havis la eblecon detale klarigi niajn proponojn. Tamen post paroladeto de mia edzino venis tuj la intervjuisto de Kanada Radio (CBC) al ŝi kaj petis ŝin ripeti la proponon por la CBC. Ĉio, kio estis dirita dum la laborgrupoj, estis surbendigita, kaj oni diris, ke ĉiuj proponoj estos detale studataj kaj konsiderataj.

Kun influriĉaj personoj

Sed nia plej granda bonŝanco estis la eblo paroli kun influriĉaj personoj dum la paŭzoj, la manĝoj kaj sociaj aranĝoj de la kongreso. Ni disdonis multajn informilojn kaj povis forigi gravajn miskoncepitojn. Se pli da esperantistoj estus partoprenintaj la kongreson, la agado por nia lingvo povus esti pli sukcesplena. Ni ja estis nur du homoj inter pli ol 1000 partoprenantoj.

Dum la ĉefaj aranĝoj de la kongreso okazis samtempa tradukado en la alian oficialan lingvon (la anglan aŭ la francan), en malgrandaj laborgrupoj la tradukado estis parte samtempa, parte posta. La sinsekva tradukado forprenis valoran tempon kaj malhelpis al aliaj kongresanoj esprimi siajn proprajn ideojn. Aŭskultado al samtempa tradukado pere de pruntedonitaj riceviloj estis por ni ege ĝena, ĉar pere de laŭparoliloj oni per unu orelo rekte aŭdis la parolanton, dum oni per la alia provis aŭdi pere de la ricevilo la tradukanton. Post komenca provo ni ne plu uzis la ricevilojn. Kvankam mi nur malfacile komprenas la francan lingvon, mi tamen preferis aŭdi la parolantojn rekte. Sekvo de la kongreso espereble estos, ke la registaro de nia provinco (edukado estas provinca afero en Kanado) pli kaj pli respektos kaj subtenos la minoritatajn grupojn. La sinteno de la anglalingvaj kanadanoj estis forte atakita, kaj ili unuafoje spertis, kiel oni sentas sin, se oni estas en minoritata pozicio. Pro la kreskanta kaj nun oficiale subtenata multkulturismo (kio necese devas signifi ankaŭ multlingvismon) la situacio por nia lingvo fariĝis pli favora; tamen por atingi palpeblajn rezultojn necesas multe pli da informado. Ni spertis, ke oficialuloj ne estas malsimpatiaj al niaj aspiroj, sed ili nenion entreprenas, ĉar la voĉema kanada publiko ankoraŭ nur postulas multlingvecon.

La usona ideo de 'melting pot' (fando-poto), en kiu ĉiuj diferencoj iom post iom kunfandiĝas la homogenajon, estis unuanime rifuzita favore al kultura mozaiko.



Andreo Szabó

La tramo grince sin turnis dufoje kaj laŭiris ambaŭ flankojn de la stranga placo. La kurentpreniloj sparkokrake frotadis la peze pendantajn kondukildratojn. La polve kaj fume nebula, maŝinspire benzinodora aero pike premis la pulmojn.

Li sidis pezlace sur la ligna benko de la tramo. Post la dua turniĝo la tramo haltis.

“Finhaltejo! Ni veturos returne, al la urbo!” — diris laŭte la konduktoro.

Li ekskuiĝe vekiĝis el la pensoj. La alvoko estis direktita al li, ja neniuj aliaj jam sidis en la tramo.

Li rigardis tra la fenestro la grize krepuskan antaŭurban placon.

... Jes ja. Sendube. La sama placo. Ĉu sonĝe? ... Ĉu reve? ... Ĉu en realo? ... Ĉu la nuno fakte vivas? ... Ne grave. Li estas denove ĉi tie. Ĉu li tuj vekiĝos? ... Ĉu finfine la realo altuŝos lian frunton per malvarmo de la trama fenestrovitro?

Li klinetis la kapon, kaj la frunto tuŝiĝis frape al la polve malpura, multskrape gratvundita fenestrovitro. La okuloj vizie rigardis la grizon de la placo.

Ĉu sonĝe? ... Ĉu reve? ... Aŭ reale? ... Li jam ne sentis kaj ankoraŭ ne sciis tion.

La konduktoro ree ekparolis, starante jam tuj apud li. “Ĉu bileton, sinjoro? Returne al la urbo?”

“Ne, dankon. Mi eltramiĝos”.

Li ekstaris ŝancelmove kaj ekiris al la perono. Sur la ŝtupetaro li haltis kaj ĉirkaŭrigardis.

Peza, grizpolve densa nebulo sursidis la malnovan, fendoplenan betonon. La mornaj ludomoj altis funebrokadre ĉirkaŭ la kalva placmezo.

Jes. La sama placo.

Ĉu sonĝe aŭ en realo li ĝin vidis tiomfoje? ... Ĉu nune li sonĝas aŭ li vidas en vero tiun ĉi malgaje humorpreman antaŭurban panoramon? ... Li ne sciis. La cerbo pulsas febre, la membroj obeis maleme al la febrosonge vualkatenita volo.

Li paŝis sur la trotuaron kaj kvazaŭ senkonscie li ekiris al angulo de iu flankstrato. La paŝoj sonis eĥe, kiel en fundo de giganta tombokavo betona. Li iris, sed li ne sciis kien. Li paŝadis, sed li ne sciis kial. Li febre atendis, sed li ne sciis kion.

Li laŭiris la flankstratan angulon. Plumba pezo liajn piedojn katenis, frostoj de senespero liajn kruojn paralizis. Kun grincaj movoj li sin trenis plu.

En fino de la flankstrato li sin trovis ĉe rivera bordo. Li haltis.

Kaj tiam li ekmemore blindis en la grize fluan akvomason kaj pense revokis bildon el la pasinteco... aŭ... eble el la nebula neniamo.

Li sin apogis al la riverborda barilo.

Li sentis kvazaŭ iu alvenis al la fino de sia vojo. Jes, fino.

Sur la piedo preskaŭ reale li sentis molan sed nerezisteblan ektiron.

... Kiel tiu malnova legendo supozas? ...

Li meditis kun rezigno, amare.

... Antaŭ la naskiĝo la Luno ligas unu piedon de ĉiu estonta viro per silka rubando. La alia fino de la rubando estas ligita al piedo de naskiĝonta virino. Dum la vivo la rubando estas nevidebla, sed la du estaĵoj serĉas unu la alian senĉese, kun sopira obstino. Se ili renkontiĝas, la surtera vivo estos por ili feliĉo kaj ĝojo. Sed se ili ne trovas unu la alian, tiam ili vagadas en la vivo sencele, drive. Ili trovas nur suferojn kaj humiliĝon kaj senĝojan sobron. Ili mortas solaj, senesperaj ...


... Kiel ĝi do plu? ... Jes... La legendoj estas ja elpensitaj por konsolo. Por konsolo kaj espero al tiuj, kiujn la realo maldorlotas per kruela rifuzo de siaj favoroj... Ankaŭ tiu ĉi legendo loge flirtigas nubon de esperoj pri vivo postmorta. Laŭ ĝia promeso tiuj, kiuj ne trovis unu la alian dum la surtera vivo, sin trovos en mondo transviva. Tie ili ekvidos la alian, al kiu la silka rubando ilin kroĉas, kaj ili estos tie kunaj, supermezure ĝojaj kaj feliĉaj ...

Li staris rigida kaj senpenso ĉe la borda kruto. Nur la promesoj de la legendo martele frapsonis en lia cerbo. La rivero bruis monotone ĉe liaj piedoj. Ie kaj tie la ŝaŭmsmacaj ondoj fontane saltadis supren kaj poste fortperde refalis en la celmanke, senvole fluan akvomason. Celmanke ja salti en la alton, senespere ja liberiĝi el la masa ordinario. Ĉu kredi al mensoge trompaj loglegendoj, ĉu fidi je tente nebulaj ĝojpro-

Kompare kun la nedubebla riĉo de la poezio en la Esperanto-literaturo, ankoraŭ nun ekzistas la granda postresto de la proza branĉo, kio respeguliĝas en ĉiujaraj Belartaj Konkursoj, ankaŭ ĉi-jare — bedaŭrinde — senescepte. Pri la drama branĉo, en kiu neniu premiigis en la ĉi-jara konkurso, la prijuĝa komisiono de la Belartaj Konkursoj esprimis sian konstaton: "La stato en krea laboro pri dramoj estas plorinda, kio estas aparte doloriga".

Kun espero, ke nia literaturo — eĉ se helikopaŝe — iam atingos altan nivelon precipe en la lamanta proza branĉo, ni prezentas la solan prozaĵon premiitan, "La legendo", por stimuli verk-talentulojn el la legantaro.

La aŭtoro A. Szabó (Hungarujo) jam plurfoje gajnis premiojn en la Belartaj Konkursoj.



Andreo Szabó

mesoj? ... Ne ... La realo pezas plumbe, forto por la venka salto mankas. Flosi nur plu, flosi laŭ la masa fluo, en sencele drona nenivolo, al la senfino de la sortodevo ...

Ŝaŭmaj ondoj de la akvo foje foje sin ĵetis en la alton sortoprove, lace, velke.

Li staris ĉe la bordo kruta kun peza muto.

... Unu salto, sola streĉo. Sortoŝanĝa, fina volo...

Unu salto, peza falo ... kaj la vano ne taŭzos plu...

Ree li ekpensis pri la legendo, pri la fabela konsolo ...

... Tiuj, kiuj ne trovis unu la alian en la surtera vivo, sin trovos en la alia mondo. Tie ili ekvidos la alian, al kiu la silka rubando ilin kroĉas, kaj ili estos tie kunaj, en feliĉo kaj supermezuraj ĝojoj...

Li ne kredis je ekzisto de alia mondo. Sed li kredis je ekzisto de tiu mistera rubando. Li kredis je ekzisto de iu virina estaĵo ĉe la alia fino de la rubando, kies vindon li sentis konstante moli sur lia kruro. Li kredis je tio, ke ĉie en la mondo, en la tuta universo, en la plena naturo, ĉiu pozitiva atomo devas havi ekvivalenton negativan. Se ili trafas unu la alian, tiam fariĝos harmonio kaj belo kaj kreo kaj kvieto. Sed se ili vagadas dise, tiam ambaŭ aparte perturbas la ekvilibron de la naturo, tiam fariĝas maltrankvilo kaj bruo kaj ĥaoso, kaj ili mem estas drivaj, senfortaj, ili vagadas de atomo al atomo, serĉante la propran antipodon, kelkfoje kun sintrompo ili cedas al brileloga tirforto de atomo antipoda kaj sin ligas al ĝi. Kaj ili volas, ili tre volas kredi, ke ili trafis la ĝustan, la unusolan, la delonge serĉatan...

... Ĉu kredi albordiĝon jam ne estas ja albordiĝo mem? ... Ĉu imagi la definitivan solvon ja ne estas jam iaspeca definitivaĵo? ...

Li meditis ĉe la rivera bordo senreve, krude, sen esperoj, en surdo de la griza sobro. La pensoj korvolekis en lia cerbo tiktake, kun anonco ĉiumomenta de la kruela forpaso... Ĉu la rubando, kiu katene ligis iam lian kruron al iu ankoraŭ nekonata, ne ŝiriĝis jam delonge sub muelaj mordoj de la sencela vagado? ...

... Ne, ĝi ne estas disŝirebla. Ĝi estas nevenkeble praforta, kiel la vivo mem. Oni povas ĝin ne vidi, oni

povas pri ĝi perfide forgesi, sed ĝi ekzistas plu, solide, firme kaj nedisŝireble...

Vesperkrepuskaj ombroj komencis jam vinde ĉirkaŭvolvi la grizon de la restinta taga helo. El fore velamento ekgrincis kelkfoje la turniĝantaj radoj de maloftaj tramveturiloj. En la proksimo eklumis lanterno super la enirpordo de drinkejo.

Li ekrigardis la lumon. La grizo de la okuloj ekfajris rebrile tra la grizo de la krepusko.

Li ekiris al la lumo.

Klap... klap... klap... klap...

La paŝoj sonis kiel obtuzaj martelfrapoj sur la malnovaj pavimoj. Ĉe ĉiu paŝo li devis fortostreĉi kontraŭ ia mistera influo, kiu lin senĉese retiris al la rivera bordo. La piedoj kvazaŭ estis... ligitaj... rubande... al la riverborda barilo...

Klap... klap.. klap.. klap...

Li paŝadis fortostreĉe, kaj volo vekigis en li, volo por atingi la lumon, volo por iri en la helon, liberiĝi el ombro de la krepusko ... Sed la krepusko lin retiris, per ombrobrakoj de la sortoflua rivermuĝo la malseko lin voke postulis ...

... Ne, ne! — li proteste kontraŭstaris la potencan alvokon kaj paŝo post paŝo penegis li movis la piedojn. ... Ne, ne! ... — li fuĝovole klopodis proksimiĝi al la lumo, al la esperige vivpromesa brileto.

... Ne, ne! ... For la mistere katenan rubandon, for la falspromesan legendon, for la vante logajn rememorojn!

... La rememorojn, jes... La rememorojn pri ĝojoj, pri esperoj, pri tente flugaj sopiroj... La rememorojn pri ŝi... pri ŝi, kiu estas jam for, kiu jam dronas nube en frosto de la neekzisto...

... Ĉu envere ŝi ekzistis iam? ... Ĉu la tuto ne estas nura sintrompo, misa logludo de la mistera rubando? ... Ĉu ĝi estis nur sintrompo, ĉu realo, ĝi plendo? ... (daŭrigo al p. 189)

Al la maro

UEYAMA MASAO (Japanujo)

BELARTAJ KONKURSOJ 1972

Originala poezio: 1-a premio


*Fonon ĉielan lumo paŝtelas,
nokto glacia fade degelas.
Spiro de l'viv' eksonas andante,
dormon de l'tero softe¹ rompante.
Rosojn zefiro flege rulrulas,
fonto ekfluŝtras, flu' sin stimulas.
Pasis for longa, vintra obskur',
takte ekpulsas kor' de l'natur'.*

*Per milda tuŝ'
de l'luma duŝ'
sopiron
maten' ekscitas.
Per lummesaĝ'
al la vojaĝ'
la rojon²
printemp' invitas.*

*Gajaj alaŭdoj solfeĝas³ soprane,
lirlas⁴ la rojo kompane.
Voĉo de amo ĉe rozo kontraltas,
revon al flugo ekzaltas.
Ĥoro de krabroj en kampo kolzflora,
fone kverado minora.
Kaj dum kresĉendas la ton' de l'koncerto
kreskas esper' en la verdo.*

*L'abismo glaŭka...
sin indicas el la fund'
tenebro⁵ faŭka.
Hurlas flu',
batas pluv'!
Muĝas vent',
fuĝas sun'
en nubaron,
kiun kirlas
man' giganta.
En la inund',
kvazaŭ kun sanga vund'
popol' ribelanta,
frakasi la jugon
celanta,
forfluas ĉio
kreita de la homa cerb',
leĝere pli ol pec' da herb'!*

La aŭtoro
Ueyama M.
(1910 –),
horloĝriparisto,
eklernis
Esperanton
antaŭ trideko
da jaroj kaj pri
la verkado
ekinteresiĝis
nur antaŭ kelkaj
jaroj, inter-
konatiĝinte kun
Miyamoto M.



*La natur' sin venĝas
kontraŭ la civilizacio.
Pro kio?*

*Kvartalo de drinkejoj dronas
en luma mar' brilanta flame.
Imagon pli fascine spronas
l'orgio neaŭdebla, tamen,
ebri' por vanta sinforlaso
nur veon, malesperon nutras,
en flata vort' de virinĉaso
fermentas pent', sincero putras.
Sen bru' la farson spegulante
sur si en la rebrilo bunta,
fluadas la rivero lante
tra l'spleno de vesper' profunda.*

*Nun la river' atingis l'estuaron.
Post la migrado sub la sun' kaj luno
tagfin' sufloras: Jam for la amaron!
Saluton nostalgian sur la duno
miskantoj velkaj per susur' esprimas,
kaj bremsas sin la rado de l'fortuno.
La pintoj de l'ondetoj pale glimas
rulantaj sin al bordo de l'fatalo,
sub kiuj la pase' tavolo ŝlimas.
Dum feblas sun' sinkanta, plumba vualo
kunfandas en leteo⁶ ambicion,
estingas l'eĥon de la vivbatalo.
Kaj ĝojon, triston, braĝan ampasion,
ĵaluzon, damnon ĉe l'perfido fia
enlasas en sin mute, glutas ĉion
l'azilo lasta, vasta, senpartia.*

Redakciaj notoj:

- 1 softe: milde mallaŭte.
- 2 rojo: mallarĝa kaj malprofunda rivereto.
- 3 solfeĝi: kanti citante la silabajn nomojn de la muziknotoj.
- 4 lirli: susureti.
- 5 tenebro: profunda mallumo fizika aŭ spirita.
- 6 Leteo: en mitologio, infer-rivero, kies akvo forgesigis suferojn kaj plezurojn de la surtera vivo.

Sankta Francisko

kaj la povraj judoj

BELARTAJ KONKURSOJ 1972

Traduka poezio: 1-a premio

La aŭtoro de la originalo, Józef Wittlin (1896 —), estas poldevena usonano. Estante profunda humanisto, li favoras Esperanton kaj apreas ĝin kiel kulturan perilon.

Tradukis el la pola: JULIUS BALBIN (Usono)

*Nomon vian ili vokas vane
La riĉaj, la orgojlaj, la virtaj kaj la sataj.
Kaj vi, se vi vivus, vi certe venus
Ankaŭ al ni, kiuj estas batataj.
Ni povraj, ĉifonvestitaj judoj,
Ni anim-lepruloj
Irantaj kun flava stigmato.
Vi nin ne abomenus,
Vi, ho sankta, goja* praavo,
Vi al la plej mizera el ni dirus: frato,
Frato favo.*

* Vulgara vorto, per kiu la judoj nomas la ne-judojn.

KONKURSOJ POR 1973

UEA denove invitas ĉiujn siajn membrojn kaj membrojn de la 58-a Universala Kongreso partopreni la Belartajn Konkursojn. La kompleta, reviziita regularo de la Konkursoj aperis en la broŝuro "Statuto kaj Regularoj de UEA", kiun ĉiu individua membro de UEA ricevis senpage. Nepre ĉiuj konkursontoj atente tralegu la regularon, precipe la artikolojn 1 kaj 2.

Kiel en la lastaj jaroj, la ĉijaraj branĉoj estas jenaj:

1. Originala poezio; 2. Tradukita poezio; 3. Originala prozo; 4. Originala drameto (por scenejo aŭ por radio).

Ĉiujn konkursaĵojn kun la aldonaĵoj laŭ la regularo oni sendu al la sekretiino de la Belartaj Konkursoj: s-ino E. Lapenna, Nova Ves 32, ZAGREB, Jugoslavio. La limdato por ricevo de la konkursaĵoj estas la 31-a de marto 1973.

La valoroj de la premioj estas difinitaj jene: por la 1-a premio, 100 gld.; por 2-a premio, 70 gld.; por 3-a premio, 40 gld.; por la premio "Nova Talento", 70 gld. Krome la nomo de la "Nova Talento" estos engravurita sur la pokalo Henry Harabagiu.

Oni aparte petas, ke konkursantoj, kiuj tradukas verkojn de nemulte konataj aŭtoroj, *aldonu al la konkursa traduko koncizajn biografiajn-kritikajn notojn pri la aŭtoro*. Tiujn notojn oni poste utiligos okaze de eventuala publikigo de la traduko.

LA LEGENDO

(daŭrigo de p. 187)

igis la mondon por li per lumo, per molo kaj per mildo. Kaj... depost tiam... ĉie nur malpleno, krudo kaj vano...

Li iris, paŝo post paŝo, malrapide al la lumo, al la drinkejporde penda sopra lampo.

... Ĉu la placo ne estas la sama? ... La sama, sur kiu iam, ĉu en sonĝo ĉu reale, la lastan fojon ili renkontiĝis? ... Kaj la tramo... la grincrada, rusta ĉaro, ĉu ne per ĝi ja tiam ili venis? ... Ĉio sama, sed la nuno krudas, malreale, froste grizas. Eble ankaŭ la iamo, la pasinta reva belo nur mensogis, miraĝflirte la mondgrizon ŝajnbeligis? ... Sed... la kredo, la sintrompa kontentiĝo, ĉu ĝi ne estas la samo, kiel... kiel... trovi la veron... la celon... la kaŝiton, ĉe la fino de la rubandsilka mistero? ...

Klap... klap... klap... klap...

Li paŝadis ĉiam pli liberiĝinte sed sen ia ajn ĝojo, maŝinece. La drinkeja pordo kelkfoje malfermiĝis, vizitantoj eniris tra ĝi aŭ elvenis kaj malaperis en la nebula vespergrizo. La rivero muĝis kun sovaĝa

indiferento. La pavimeroj resonis la kalkanfrapojn kun seninteresa grinco.

Klap... klap... klap... klap...

Li iris al la lumo, al la drinkeja pordo. Li iris, kaj li ne sciis, pro kio kaj por kio li iras. La lumo lin tiris, la malvarme brila voko de la helo.

La iro ŝajnis esti por li kvazaŭ senfina. Ĉiu paŝo estis peniga, kiel se la piedoj estus el plumbo...


Klap... klap... klap... klap...

La paŝfrapoj sonis plumbotinte sur la griza pavimo. Li paŝadis fortostreĉe. Volo en li jam vekiĝis por atingi helon, lumon, liberiĝi el la ombro de la morno. Sed la morno lin retiris. Ombrobrakoj, sortoflua rivermuĝo, la malseko lin postulis, voke tenis...

... La legendo... Lunrubando... Forta ligo... Esperceloj, sunradia estonteco...

Klap... klap... klap... klap...

La piedoj monotonis kun grinca maŝineco. Eble jam eĉ haltigi ilin estus neeble. Li mem estis jam nur flirta pilko, ludilmoveto, nenivole sin perdinta fluga ombro inter voko de la muĝo kaj altiro de la helo. La legendo lin katenis, la pieda streĉa movo lin al novo puŝe sendis. Li sin sentis nur duono, fortomankanta fala birdo en ventego tondre muĝa, ŝvebe inter la realo kaj la mito pralegenda, tutoserĉa duonparto de la homo estonteco por si kreanta, eternecon postulanta. Rivermuĝo de la vano ondis surde, krepuskombre.



DU VIRINAJ VERKOJ

el Soveta Unio



L. Ukrainka

Recenzas Julius F. Balbin (Novjorko):

Liriko de Lesja Ukrainka. Komp. Nadija Andrianova. Kievo: Komisiono de Ukrainaj Esperantistoj, 1971. 86p. Ilus. 21cm.

*Kor', haltu, kor'! ne batu furioze.
Pens', trankviliĝu kaj ne flugu alten!
Ne svingu en vakuo per flugiloj.*

Ĉu nove malkovrita poemo de Zamenhof? Ne, — komenco de lirikaĵo fare de Lesja Ukrainka (n.1871). Ŝia nomo mem ŝajnis simbolo de ŝia poezio tute trapenetrita de ukraina folkloro kaj amo al popolo kaj libereco. Ĉar "ŝi fariĝis la plej granda nacia poetino de Ukrainujo, inda heredantino de Taras Ŝevĉenko, fidela kunbatalantino de Ivan Franko" kaj tiel eniris la panteonon de la tutmonda literaturo, estis dezirinde aperigi reprezentan kolekton de ŝia verkaro en la Internacia Lingvo.

Tion faris, aŭ almenaŭ klopodis fari la eldonintoj de la 86-paĝa ofsete presita libreto. Bedaŭrinde, kvankam ĝi enhavas konsiderindan nombron da tre belaj kaj tre bone tradukitaj versaĵoj, multaj tradukoj ne atingas la nivelon indan de la poetino. Inter la tradukintoj elstaras la jam bone konataj K. Gusev, A. Logvin kaj H. Dresen.

Embarasas pluraj gramatikaj eraroj, kiel, ekzemple, misuzitaj faktitivoj* (*vekigi mortajn*, p. 61), aŭ uzo de netransitivaj verboj kiel transitivaj (*nomon sian eterninte*, p. 75). Ĉu tio foreksplikeblas kiel poezia licenco? Certe ne. La editorino** ŝajne ne scias, ke *rondeau* esperantiĝas per *rondelo*, *nocturno* per *nokturno* kaj *sestina* per *sestino*. Krome, la presprova laboro evidente fiaskis: mi malkovris ĉirkaŭ tridek preserarojn, kelkajn tre ĝenajn aŭ rekte amuzajn.

Lesja Ukrainka certe meritis pli zorgoplenan kudradon de ŝia Esperanta vestaĵo, antaŭ ol aperi sur la scenejo de nia kulturo.

Mendu ĉe UEA: 1,80 gld. (por Nederlando 1,88 gld.) plus sendokostoj 10%.

* faktitivo: gramatika voĉo, kiu esprimiĝas en Esperanto per la sufikso -ig-.

** editoro: tiu, kiu pretigas por publikigo verkojn ĝenerale de mortinta aŭtoro.

Recenzas Clelia Conterno (Italujo):

Kuŝanta tigro, de Lilli Promet. El la estona tr. Alma Lekko. Tallinn: Eesti Raamat, 1971. 76p. Ilus. 17cm.

El turmentita tero, kun forte karakterizita personeco (ankaŭ lando havas sian personecon), venas supera sintezo, tiel, ke la okazaĵoj aperas kvazaŭ filtritaj tra la doloro kaj la homa kompreno, en rafinita atmosfero senantaŭjuĝa.

Lilli Promet kapablis tion fari por ni, kiuj konatiĝis kun ŝi tra la perfekta traduko de Alma Lekko. Ŝia prozo, en tiu ĉi novel-kolekto, kie ĉiu ero estas juvelo, ie-ie memorigas Kafka'n kaj Solĵenicin. Vidu Oliver'on, kiu sukcesas, nur kiam li ŝanĝas la ridon en bojon, aŭ la Aglon, kun la elokventa refreno "kaĝo estas kaĝo" kaj la fina glaciiga "apatio de subiĝo": "ĝi jam al kutimiĝis", konkludas distrite la zoo-gardisto. Vidu tiun ŝian malrapidigon de la movoj: ŝiaj skizoj de lante agantaj figuroj en la fono; vidu la pasian poemon pri estona vintro en la ero




L. Promet

Kuŝanta tigro, kies titolon ŝi elektis ankaŭ por la libro. Ŝi scias elvoki imagojn ampleksajn per du vortoj: tiu "dormema lumo" sur "cindrogrizaj haroj" de patrino! Ŝi ludas sur delikataj kordoj de homaj sentoj. Kaj, rimarku, nek la prezento de *Guernica*, nek la fina mirinda novelo, kiu intense memorigas pri *La marsilento* de la franca Vercors, implicas politikan sintenon; ili estas nur la poezia rezulto de ama alrigardo al la homa eno.

Post ĉi ĉio, mi devus, kiel kutime, "konsili la legadon". Sed, ĉu "konsili la legadon" de ĉefverko havas ian signifon? Ne. Mi prefere konsilus plion: al atentemaj, al seriozaj legantoj, la serĉadon, iel, de pluaj verkoj de Lilli Promet: ĉar la deziro plu konatiĝi kun ŝia personeco fariĝos por ili, kiel ĝi fariĝis por mi, fortega incito.

Mendu ĉe UEA: 1,86 gld. (por Nederlando 1,93 gld.) plus sendokostoj 10%.

Bonege ilustrita informilo anglalingva



Recenzas Kenneth G. Linton (Aŭstralio):

About Esperanto. Greenfield (Mass., Usono): Channing L. Bete Co. Inc., 1972. 15 p. Ilus. 28 cm. (Serio "Scriptographic Booklets").

Ĉi tiu bonege ilustrita informilo prezentas al la anglalingva serĉanto plenan informon pri la Internacia Lingvo, komencante per la grafika prezento de la grava problemo de internacia komunikado, sed tuj sekvigante tion per tre kontentiga prezento de la solvo, inkluzive de mallonga sed sufiĉa historio de la lingvo, respondoj al la plej oftaj demandoj, sistema klarigo de la elparolo, ortografio kaj gramatiko, akcentanta la aglutinan karakteron de la lingvo, per kiu oni tiel facile aldonas al la vortprovizo.

Sekvas ekzemploj de konversacio kaj korespondado, kun listoj de periodaĵoj, literaturaj eldonoj, lernolibroj, vortaroj, kaj fine la atingoj de la hodiaŭa Esperanto-movado kaj la esperoj de la morgaŭa.

Ĉi tiu facile legebla libreto estas evidente sufiĉe malmultekosta por fordoni al interesitoj.

Mendu ĉe UEA: 2,40 gld. (por Nederlando 2,50 gld.) plus sendokostoj 10%.

Apetitiga legolibro

Recenzas Fred Parker (Britujo):

Esperanta legolibro, de Elio Migliorini. Itala Instituto de Esperanto, 1972. 255 p. 17 cm.

En tiu ĉi Internacia Libro-Jaro estas bone, ke la Itala Instituto de Esperanto trovis ebla prezenti la kvinan eldonon de *Esperanta legolibro*, plene reviziita kaj pligrandigita. Ke ĝi estas la kvina eldono, atestas la sukceson de la aŭtoro doni al legantoj de nia Esperanta literaturo ekzemplojn de la verkaĵoj de niaj plej ŝatataj verkistoj, de L.L. Zamenhof, Theo Cart, E. Privat, J. Baghy, ĝis la nuna tempo K. Kalocsay, R. Schwartz, I. Lapenna, M. Boulton, W. Auld, nomoj, kiuj garantias teni la legantojn.

La enhavo estas en tri partoj, respektive *Tra la vivo*, *Tra la lingvo*, *Tra la literaturo*, kaj tralego de la pecoj povas 'akrigi la apetiton' por pli bone koni la verkaĵojn de niaj altrangaj verkistoj.

Tre klare presita sur bona papero, kun trafe desegnita kovrilo kaj formato taŭga por vira poŝo aŭ virina mansaketo.

Mendu ĉe UEA: 6,54 gld. (por Nederlando 6,80 gld.) plus sendokostoj 10%.

Valora helpilo por hispanlingvanoj

Recenzas José Fernando Soler Sempere (Hispanujo):

¿Habla Usted en Esperanto?, de Ergoto de Bonaero. Buenos Aires: la aŭtoro, 1972. 182 p. Ilus. 18 cm.

Temas pri instrua libreto, por hispane-parolantoj; ĝi estas, laŭ metodo, gramatika kaj rekta, kaj la multnombraj ekzemploj gvidas la lernanton por la perfekta uzado de reguloj. Al tio helpas ankaŭ la desegnaĵoj, kiuj ilustras la libreton.

Speciala merito de la lernilo estas la ofta rimarkigo de la sintaksaj diferencoj inter la Esperanta kaj la hispana lingvoj, kio estas tre necesa.

Elementa vortareto estas ĉe la fino de la libreto, kaj mi pruvas mian tralegon per averto pri la kreola traduko de kelkaj vortoj. Ekz.: nudelo = fideos (tallarín); pichón = birdido (kolombido), k.a., tute negravaj, sendube korektaj laŭ argentina parolmaniero, kaj facile akcepteblaj de pure kastile-parolantoj.

Resume: "¿Habla Usted en Esperanto?" de Ergoto de Bonaero estas valora helpilo por lernantoj de Esperanto en la hispanlingvaj landoj.

Mendu ĉe UEA: 6,06 gld. (por Nederlando 6,31 gld.) plus sendokostoj 10%.

Interesaj vojaĝ-rakontoj


Recenzas Theodor Kilian (Ĉeĥoslovakujo):

Rakontoj el pluraj landoj, de Fred Parker. Londono: Brita Esperantista Asocio, 1972. 89 p. Mimeografita. 21 cm.

La broŝuro enhavas rakontojn kaj priskribojn de landoj, kiujn la aŭtoro vizitis. Ambaŭ certe kaptos la intereson de la legantoj. Ĉe siaj vojaĝoj eksterlanden li vizitadis UEA-delegitojn, kies utilajn servojn li elokvente priskribas. Tiamaniere li en netrudema formo demonstras al la novaj esperantistoj por kiuj la broŝuro estas destinita, ke Esperanto vivas kaj bone servas. Tiun ĉi efikan procedon ne eblas sufiĉe apreci.

La lingvo mem, bedaŭrinde, ne estas senmanka. Kelkloke la frazoj estas malfacile kompreneblaj: "Mi havas peton kiu povas esti malfacila kaj eĉ danĝera por vi havigi". Ofte mankas komoj ĉe subordigitaj propozicioj, male superfluas la difina artikolo, kelkloke eĉ erare uzita: "Jes, kriis ĉiuj la infanoj". Plurfoje uzas la aŭtoro post "kvazaŭ" la indikativon anstataŭ la us-modo. La dua eldono certe forigos la menciitajn mankojn.

Mendu ĉe UEA: 2,58 gld. (por Nederlando 2,68 gld.) plus sendokosto 10%.



Romanista konsciencvekilo


Recenzas Marjorie Boulton (Britujo):

Infanoj de la malriĉuloj, de John A. Lee. Tradukis Bertram Potts. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda, 1972. 271 p. 17 cm.

Tiu ĉi kortuŝa kaj konsciencveka rakonto de John Lee, verkita en 1931, ne plu rilatas al la aktualaj vivkondiĉoj en Nov-Zelando, kie ĝi multe instigis sociajn reformojn; sed ĝi restas universala riproĉo pri la rezultoj de prema malriĉeco, kaj valora dokumento pri la realaĵoj de infanpsikologio. Ne tedante per troa teoriumado, ne naŭzante per unuflanka dogmeco, ĝi firme restas ĉe individuoj, kompatindaj, miksmotivaj, kredindaj. Ĝi montras fizikajn suferojn de malriĉeco, sed pli emfazas pli tragikajn rezultojn: moralan degenerigon; devigan malmoliĝon; mankon de psikaj luksaĵoj kiel ĝentileco, delikateco, tenereco, kulturo, beleco; malestimon al leĝoj; atendon viktimiti. Maljusta socio malbonigas kaj poste punas homojn. La libro restas grava konsciencvekilo pri granda parto de la mondpopolo, verkita kun estiminda romanista arto.

La traduko estas kompetenta kaj konscienca, foje bele trafa, kaj la verko ĝenerale legiĝas kvazaŭ originalaĵo. Kelkaj negravaj malfacilaĵoj en la tradukado estas ellasitaj; la stilo kaj etoso bone kaptitaj. Jen pensiga libro, kiu meritas vastan legantaron.

Mendu ĉe UEA: 9,60 gld. (por Nederlando 10,— gld.) plus sendokostoj 10%.



Taŭga informilo por sportuloj

Recenzas K. Ruig (Nederlando):

Esperanto: lingvo de la sporto, Ralph Harry. Nürnberg: Ludwig Pickel, 1972. 30 p. 21 cm.

Trilingva konversacilibreto (germana, Esperanta, angla), kompilita por helpi antaŭenigi la olimpian idealon farante amikecojn inter diversnaciaj sportuloj. Bone prizorgita broŝuro.

Bedaŭrinde estas, ke la larĝo de la broŝuro estas ĝuste iom tro granda por konformi multajn kostumpoŝojn. Ĉiu paĝo enhavas ĉ. 15 terminojn aŭ fraze-tojn po unu sporto; do la konversacia materialo estas tre limigita.

Krome la malmultaj esprimoj ne ĉiam rilatas speciale al la indikita sporto, ekz. la rubriko korbopilkado. La limigita paĝaro ne estas optimume utiligita. Lingve la libreto estas preskaŭ senerara.

La libreto estas tro surfaca por povi esti rekomendata kiel vera sporta konversaciilo, sed kiel informilo por la Internacia Lingvo inter sportuloj ĝi bone taŭgas.

Mendu ĉe UEA: 4,14 gld. (por Nederlando 4,31 gld.) plus sendokostoj 10%.

LASTE APERIS...



About Esperanto, the international "second language" (1972) Eld. K-io Channing Bete, Usono. 15p. 28cm. Ilus. 2,40 gld. Studkajero uzebla kiel ĝenerala informilo aŭ enkondukilo por kursoj. Bonegaj enhavo kaj prezento.

ABZ de amo . . . Inge kaj Sten Hegeler. El la dana tr. Ib Schleicher kaj August Weide. 274p. Desegnaĵoj. 25cm. Bindita per ledimita plasto. 33,78 gld. Enciklopedio pri la seksa vivo, por maturaj paroj en la aĝo de 30 ĝis 50 jaroj.

Esperanto, lingvo de la sporto (1972) Ralph L. Harry. 32p. 21cm. 4,14 gld. Trilingva (germana-Esperanta-angla) frazlibreto por sportistoj.

FIAT 128 (1972) Ilustrita faldfolio pri nova aŭtomodelo. Senpage ricevebla de FIAT-Reklamado, Torino, Italujo. (presaĵo n-ro 2847).


First course in Esperanto, A William Auld. 32p. Ilus. 28cm. 6,72 gld. Dekleciona, tre alloge prezentita kurso, facile adaptebla por internacia uzo. Celas instrui en 14 horoj kiel eble plej utilan kvanton da materialo. Taŭga por lernantoj de ĉiuj aĝoj kaj ankaŭ por lernejoj klasoj.

Estas mendeblaj ankaŭ 6 kasetoj kun la kompleta parolita teksto (voĉo de la aŭtoro). Komplete (6 kasetoj, 1 lernolibro, 2 informbroŝuroj, ktp. en skatolo) kosta 269,— gld.

Gluaĵo "Ask about Esperanto the International Language" 5 x 20 cm. Nigra teksto sur helverda fono. 0,18 gld.

¿Habla usted en Esperanto? (Ĉu vi parolas en Esperanto?) Ergoto (de Bonaero). 182p. 18cm. Ilus. 6,06 gld. Baza kurso klasikstila: 20 lecionoj kun vortaretoj, gramatikaj klarigoj kaj ekzercoj; kelkaj legaĵoj; ĝenerala vortareto ĉe la fino. Argentina.

Internacionala Eugène Pottier/Pierre Degeyer. xii, 31 p. Ilus. 8 x 8 cm. 6,06 gld. Lede bindita. La teksto de la himno La Internacio en 31 lingvoj, inter kiuj ankaŭ Esperanto.



Recenzas Tibor Sekelj (Beogrado):

La vojaĝo al Novzelando, de Hori Syôiti. Maebaŝi (Japanujo): Gunma Esperanto-Societo, 1972. 127 p. Ilustrita. 21 cm.

Legante tiun ĉi libron oni akompanas la aŭtoron tra (ne "al" kiel indikas la titolo) ambaŭ insuloj de Novzelando kaj vizitas ĉiujn iliajn vidindaĵojn. Sed ne nur tion. Oni renkontas multajn esperantistojn kaj aliajn, hazardajn kunulojn. Profesoro Hori, natursciencisto, nek povas nek provas kaŝi tiun sian econ: alternas ĉapitroj kun sennombraj sciigoj pri la naturo, precipe botaniko — kun samkvanto da latinaj nomoj — kun simplaj homaj spertoj, interparoloj, pripensoj, foje eĉ naivetaĵoj por okcidentano. Ĝuste tiuj senpretendaj paĝoj donas al la libro tiun homan dimension, kiu igas ĝin agrabla legaĵo por ĉiuj.

Sur p. 60 la aŭtoro rekomendas konservi la unuecon de Esperanto per internaciaj renkontoj. Al tio mi aldonas la nepran neceson, ke ĉiu presaĵo estu anticipite kontrolita de alilingvano. Tiam ne aperos strangaj esprimoj kiel "pli kaj pli bone ol antaŭe" (p. 13), "kristonaska...manĝĉambro" (anst. kristnaska...manĝoĉambro) (p. 21), "gefiloj *inter* s-ro... kaj edzino" (anst. *de*) (p. 42) ktp.

Mapoj kaj skizoj helpas la orientiĝon; la fotoj estas tro malgrandaj. Preso, papero, kovrilo kaj bindo altkvalitaj.

Mendu ĉe UEA: 10,44 gld. (por Nederlando 10,86 gld.) plus sendokostoj 10%.

Recenzas Juan Régulo Pérez (Hispanujo):

Problemoj de etnaj minoritatoj en Hispanio. Aranĝis U. J. Moritz. Nürnberg: Ludwig Pickel, 1971. 40 p. 21 cm.

Ekzisto de hispana lingvo estas ĉies konaĵo, sed ne kunekzisto de aliaj etnolingvoj en Hispanujo. Nu, ĉ. jaro 1000 elkonturiĝis en Iberio kvin latinidaj etnolingvoj, nome: galega (kies suda alongo konsistigas la portugalan regnolingvon), leona, kastila, aragona kaj kataluna, apud la vaska, antaŭlatina lingvorelikvo. Ĉiu havis tiutempe proksimume egalajn ŝancojn; sed posta hegemonio de Kastilujo subigis la aliajn kun premsufoko de la leona kaj aragona kaj paŭperismo de la tri ceteraj — kiuj tamen sukcesis rezisti ĝis hodiaŭ.

Pri tiu etnoluktado kontraŭ Kastilujo, kun ĉi ties politikaj ekonomiaj konektaĵoj, temas la kape citita broŝuro, kies enhavon startigis artikolo de s-ro Moritz en "Germana Esperanto-Revuo" (titolita *Hispanio strangolas etnajn minoritatojn*) kaj telegramprotesto pro proceso en Burgo.

Aldonitaj estas ampleksaj hispanaj kaj eksterhispanaj reagoj. Mapaj skizoj kaj baza bibliografio kompletigas la atentindan kompilaĵon.

Mendu ĉe UEA: 3,50 gld. (por Nederlando 3,64 gld.) plus sendokostoj 10%.

Inversa vortaro (1972) Klaus Schlüter. 35p. 21cm. 4,14 gld. Listo de ĉiuj radikoj el Plena Vortaro kaj Suplemento, kompilita per komputilo kaj ordigita laŭ la sinsekvo de la *lastaj* literoj. Aparte interesa por poemtradukantoj kaj terminologoj.

Manual de învățat limba internațională Esperanto, cu exerciții structurale (1971) I. Petrin. 125p. 30cm. 4,40 gld. Lernolibro por rumanoj, kun strukturaj ekzercoj.

Poŝtkartoj "Ginggangŝan" Fremdlingva Eldonejo, Pekino. Serio de 10 bildkartoj koloraj pri "la unua kampara revolucia bazloko de Ĉinio". Unu serio 0,50 gld.

Poŝtkartoj "Jan'an" Unu serio 0,50 gld. Serio de 12 koloraj bildkartoj pri la "revolucia sankta loko de Ĉinio", dumilite sidejo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinujo.

Prañjaparamita hrjdaja sutro El la sanskrita tr. Ikeda Hiroŝi. 27p. 21cm. 2,10 gld. Budhana prateksto pri la ideo de 'ŝunjato', kun antaŭparolo, notoj kaj sanskrita originalo.

Trento: ĉirkaŭaĵoj kaj altebenaĵo Pinè 28p. Ilus. 21 x 20 cm. Kolorpresita turisma broŝuro, havebla ĉe Ente Provinciale per il Turismo, I-38100 Trento, Via San Marco 27, Italujo.

LA FOTOKOPIA SERVO PROPONAS:

pretajn, kompletajn kaj tuj livereblajn fotokopiojn de la ĉi-sube listigitaj verkoj. Ĉiu kompleto en plasta bindaĵo.

Anni kaj Montmartre (1930) Raymond Schwartz (1894-). 126p. Ilus. 20,70 gld. Originala romano.

Esperantisto, La (1889-1891) Eld. Chr. Schmidt, poste L. Zamenhof. La unuaj du jarkolektoj de la unua gazeto de Esperanto, de n-ro 1 (1. sept. 1889) ĝis n-ro 11-12 de la jaro II (nov-dec. 1891). Entute 122p. grandformataj. Eld. en Nurnbergo. 37,60 gld.

Esperanto atslega 32p. 1,80 gld. Latva eldono antaŭmilita de la konata Ŝlosilo de Esperanto. (Sen plasta bindilo, nur krampita.)

Eterna bukedo, poemoj el dudekdu lingvoj (1931) Tr. K. Kalocsay (1891-). 351p. 54,60 gld. Kun biografiaj-kritikaj notoj pri la poetoj kaj rimarkoj poetikaj de la tradukinto. Elstara antologio, multe influinta la Esperantan poezion.

Galerio de Zamenhofoj (1924) Komp. Edvardo Wiesenfeld. 40p. plus 18 portretoj kaj geneologia arbo de la familio Zamenhof. 13,30 gld. Biografiaj studoj.

Latva-Esperanta vortaro (1932) T. Indra. 96p. 16,— gld. Pli ol 8 000 latvaj vortoj.

Latvaj kantoj en Esperanto (1927) Tr. kaj komp. Ed. Jaunvalks. 63p. 11,10 gld. Sen muziknotoj.

Planlingvaj problemoj (Esperanto kaj la naturalismo) William Gilbert. 100p. 15,40 gld. Kun enkonduko de W.J.A. Manders. Kritika eseetaro el 1962 kontraŭ la lingvaj teorioj de la t.n. naturalisma skolo en interlingvistiko.

Por recenzo! (1930) K.R.C. Sturmer. 61p. 10,— gld. Originala novelo de la angla aŭtoro konata ankaŭ sub la pseŭdonomo Kenelm Robinson.

Rimportretoj: Galerio de Esperantaj steloj (1931) K. Kalocsay (1891-). 128p. Ilus. 20,80 gld. Originalaj rondelformaj poeziaj portretoj pri konataj personoj, de Julio Baghy ĝis Lidja Zamenhof.

Se grenereto . . . (1930) Kenelm Robinson (pseŭdonomo de K. R.C. Sturmer). 158p. 25,— gld. Originale verkitaĵ, psikologie interesaj noveletoj, parte aŭtobiografiaj, de angla aŭtoro.

Tajdo, La (1928) N. Hohlov. 61p. Frontispico. 11,40 gld. Lirika poemaro.

Vol. II (1931) Kenelm Robinson (pseŭdonomo de K.R.C. Sturmer). 72p. 13,— gld. Unu anglalingva kaj tri esperantlingvaj noveloj plus kelkaj anglalingvaj poemoj, ĉiuj originale verkitaĵ.

LOKE — FAKE

LOKE

Brazilo

- En la 7a Kultura Seminario, okazinta en julio, partoprenis 250 personoj. Salutis ĝin per letero interalie la aŭstruja prezidanto d-ro Franz Jonas. Okaze de la inaŭguro de zamenhofa busto en placo de la seminaria urbo Curitiba parolis ankaŭ la pola konsulo. La venontjaran Seminarion invitis unuafoje aŭtoritatulo: la urbestro de Marília.

Eŭropo

- La 5an Trilandan Esperantistan Renkontiĝon, por Aŭstrujo, Italujo kaj Jugoslavio, okazintan en septembro en la aŭstra urbo Klagenfurt, partoprenis ĉ. 150 personoj inkluzive de 2 germanoj. En sia akcepto la urbestro Hans Ausserwinkler parolis i.a. pri la komuna punkto de la laboroj de la esperantistaro kaj la strebado de la urbo, nome por amikeco kaj interkompreniĝo inter la popoloj. Por arbo plantita de la manoj de la 3 nacioj en la Eŭropo-parko, la urba ĝarden-direkcio starigis tabulon en la Internacia Lingvo.

F. R. Germanujo

- Sekve de la eventoj dum la Olimpiko en Munkeno, la registaro planas varbi 200 policistojn, kiuj scipovas judon kaj karateon, bonege ŝoforas kaj pafas kaj kapblas paroli, krom la germanan lingvon, la anglan, francan kaj "se eble, ankoraŭ unu alian lingvon, — ekzemple araban". La koncerna ministro diris: "Se ni povus trovi tiajn, ni estus tre feliĉaj".

Koreujo

- Universitato Meong-Ji decidis doni stipendion al f-ino Li Zeongsuk, triajara studentino, por 1972-1973. Ŝia merito estas, ke ŝi modele laboris por Esperanto en kaj ekster la universitato.

Madagaskaro

- Laŭ decido de la nova registaro de Malagasa Resp-

ubliko farita en la 13a de oktobro 1972, nur dum transira periodo estos akcepteblaj, ke oni elektu la francan lingvon en la ekzameno por ŝtatoficistoj, sed iom post iom ĉio fariĝu en la malagasa lingvo. Cetere la franca ne plu estos oficiala lingvo paralele kun la malagasa. La franca lingvo kaj ĉio rilate al ĝi perdos sur la malagasa teritorio.

Usono

- En la Centra Parko de Novjorko nun staras bonvenigaj indikoj en la 4 fremdaj lingvoj, "plej vaste konataj de turistoj en la urbo": la franca, germana, hispana kaj japana. La multlingveco de Novjorko speguliĝas ankaŭ en la subtera fervojo, kie la oficialaj anoncoj nun aperas en la angla kaj la hispana.

FAKE

Arto

- En ĉiu nepara jaro organizas internacian konkurson de fantaziaj pentraĵoj faritaj de infanoj (de 7-15 jaroj) la Popola Lernejo de Arto en Ĉeĥoslovakujo (Ludová škola umenia, Mudroňova ulica 29) sub la protektado de la Ministerio pri Lernejoj en Slovaka Socialisma Respubliko. Oni sendu sian pentraĵon por la sekvonta konkurso ĝis la fino de marto 1973 al la adreso kun tekstoj en Esperanto.

Edukado

- La nova ministro por klerigo en Bulgarujo rekonas publike la valoron de Esperanto. Rilate al la internacia Pedagogia Didaktika Eksperimento (PDE; vd. p. 121 de *Esperanto* 1972), estas eldonitaj ministeria dekreto kaj klaraj preskriboj por eklaboro de pliaj 3 novaj eksperimentaj klasoj. La instruistoj en PDE (en Bulgarujo) ricevos 5% pli altan salajron.

Literaturo

- Ekde 1971 la itala literatura rondo "La Patrolo" okazigas internacian literaturan konkurson Patrolkonkurso. En la ĉi-jara konkursado gajnis premiojn 3 geitaloj, 2 bulgarinoj, po 1 norvego kaj usonano. La oficiala premiado okazis dum la Itala Esperanto-Kongreso en Pisa en septembro, kun la ĉeesto de itallingva verkisto Luigi Malebra.

Mortis akademiano Pumpr



T. Pumpr

La 10an de septembro mortis en Praha en la aĝo de 66 jaroj jur-doktoro Tomáš Pumpr, membro de la Akademio de Esperanto kaj honora membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, eminenta esperantologo kaj renomata tradukanto proza same kiel poezia. Esperantisto ekde 1926. Post tradukdebuto en la "Ĉeĥoslovaka antologio" (1935) libroforme aperis liaj tradukoj "Bukedo el ĉeĥaj naciaj mitoj" de K.J. Erben (1935), "Bapto de caro Vladimir" de K. Havlíček Borovský (Stafeto, 1953), "Poŝatlaso de la mondo" (Kartografie, Praha, 1971). En "Sileziaj kantoj" (Bezruč) li estis kunaŭtoro de la Esperanto-versio. Radio Praha elsendis laŭ liaj tradukoj la operojn "Vendita fianĉino" (Smetana), "En la puto" (Blodek), "Naja-

do" (Dvořák) per la fama "Verda stacio" kaj en ĉeĥlingva traduko la teatraĵon de M. Dekker "La mondo ne havas atendejon". Pluraj tradukoj restas en manuskriptoj, ekz. de la fama "Majo" de Mácha, dum la poemaro de S. Čech "Kantoj de sklavo" aperis ĉinlingve (1960), kie Esperanto rolis kiel pontlingvo.

Li plurfoje science traktis problemojn de la Esperanto-gramatiko: diskutoj kun Kalocsay en "Literatura mondo", 106-paĝa traktato "Esperanto sen aspektoj?" en la "Simpozio pri -ata/-ita" (Stafeto, 1961), "Resumo de la Esperanto-gramatiko" (ĉeĥa).

Funkcioj i.a.: estro de literatura komisiono de Esperanto-Asocio de Ĉeĥoslovaka Respubliko, redakciano de "Nica literatura revuo" kaj daŭra lingva kaj jura konsilanto en la landa movado.

Ne dorlotata de la vivo, tamen viro, ege laborema, societama kaj akrasprita kaj super ĉio — tre modesta. Kiel homo kaj esperantisto: ne forgesbla.

J. Mařík



58-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Beograd, 1973 07 28 – 08 04.

Alta Protektanto: Prezidanto de Jugoslavio, Josip Broz Tito

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando

OFICIALA KOMUNIKO

Aliĝkotizoj de la unua periodo

	gld.
1. Kongresano ne membro individua de UEA	90,—
2. Kongresano individua membro de UEA kun	
Jarlibro (MJ)	75,—
3. Kongresano indiv. membro de UEA kun	
Jarlibro kaj "Esperanto"	60,—
4. Edz(in)o de Kongresano en kategorio (1).	63,—
5. Edz(in)o de Kongresano en kategorio (2) aŭ (3).	52,50
6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara	27,—
7. Universitata studento ĝis inkluzive 30-jara	45,—
8. Blindulo	36,—

Senpaga "Esperanto"

Ĉiu kongresano en kategorio 1 (t.e. kiu ne estas individua membro de UEA) ricevas senpage la revuon "Esperanto" dum la tuta kalendara jaro, en kiu okazas la kongreso.

La Alta Protektanto

La prezidanto de Jugoslavio, Josip Broz Tito, akceptis la inviton fariĝi honora protektanto de la 58a Universala Kongreso de Esperanto en Beograd en 1973. La jugoslavia prezidanto jam patronis la 38an UK-on en Zagreb 1953. Prezidanto Tito iam lernis Esperanton kaj simpatias al ĝia movado.

Oficiala bulteno kaj aliĝilo


Sespaĝa, grandformata kaj ilustrita bulteno de la 58a Universala Kongreso en Beograd kaj la aliĝilo estas senpage riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la Kongresaj perantoj, ĉe la landaj asocioj kaj ĉefdelegitoj de UEA.

Kongresa glumarko

Ankaŭ ĉi-jare aperis bela glumarko pri la Kongreso. Mendojn akceptas la Libro servo de UEA. La prezo de dekmarka folio estas 0,50 gld. (1 int. respondkupono): por Nederlando 0,57 gld.

13-a Internacia Infana Kongreseto

La infankongreseto okazos en "Pionira Urbo" de Beograd de sabato la 28a de julio ĝis sabato la 4a de aŭgusto 1973. Ĝi estas rezervita al infanoj de 6 ĝis 13 jaroj, kies lingvoscio ebligas sekvi la programon gvidatan tute en Esperanto. Partopreno estas limigita je 160 lokoj. Aliĝiloj estas senpage riceveblaj ĉe la kongresa adreso.



Beograd en koloroj


Faldfolion en Esperanto pri la kongresurbo ĵus eldonis la Turista Oficejo de Beograd. Interesiĝantoj bonvolu skribi al: 58a UK de Esperanto, Terazije 42, YU-11000 Beograd, Jugoslavio.

Oficiala Postkongreso

La oficiala postkongreso de la 58a UK okazos de la 5a de aŭgusto ĝis la 12a de aŭgusto 1973 en Ateno, Grekujo.

29-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO

La jarkongreso de la junulara sekcio de UEA (TEJO) okazos en Sarajevo, Jugoslavio, de la 21a ĝis la 27a de julio 1973. Adreso de la organiza komitato: 29a IJK, V. Polagica 8/1, YU-71000 Sarajevo, Jugoslavio.



TEJO

TEJO-redaktoro: G. D. Winkler

Jaegerstr. 27, D-42 Oberhausen-Sterkrade, F.R.G.

SEJM moviĝas

Okaze de la ĉijara konferenco de Soveta Esperantista Junulara Movado (SEJM), kiu okazis en Moskvo, oni elektis novan estraron: prezidantiĝis A. Gonĉarov el Barnaul, la ĝisnuna prezidanto B. Kolker el Ufa iĝis vicprezidanto pri internaciaj aferoj kaj A. Medinŝ el Riga restis sekretario de SEJM-komitato. La konata aktivulo V. Ŝilas el Vilnius ekŝiĝis.

Niaj sovetaj geamikoj priparolis ankaŭ la sekvont-jaran agadprogramon, kaj estis projektita aro da aranĝoj julie/aŭguste 1973; unu sekvos la alian: en Leningrado okazos seminario por junaj Esperanto-instruantoj, en Estonujo komuna tendaro esperantista kaj naturpionira, al Latvujo invitos la ĉefaĵoj: la 15a Somera Esperanta Junulara Tendaro (SEJT) kaj la samtempa 7a Konferenco de SEJM, — la tradiciaj ĉiujaraj aranĝoj en Soveta Unio; verŝajne ankoraŭ sekvos dua komuna tendaro kun pioniroj, kiu okazus en Soĉi, konatega banloko sur la duoninsulo Krim.

Rondo Harmonia — pri junaj japanaj altlernejoj

Malfruas, tamen menciindas, informo pri la unua kunvivado de "Rondo Harmonia de altlernejoj", okazinta fine de marto en la urbo Fukujama, gubernio Hiroŝima. La tiea RH de altlernejoj, kies membroj entute estas pli ol cent, estas unu el la sekcioj plej aktivaj kaj energie disvastigantaj la Internacian Lingvon. La kunvivado mem partoprenis proksimume tridek junaj rondanoj, kiuj studis la lingvon dum la kunvivado i.a. per propra, de ili mem eldonita rektmetoda teksto: "Nova Kurslibro"; poste ĉiu partopreninto revenis al sia hejmurbo entuziasmigita celante estonte pli vigle subteni la movadon. La centra kontaktadreso de "Rondo Harmonia de altlernejoj" estas: p/a Tuyama-kōsen-ryo, Numa 624-1, Tuyama-si, Okajama-ken, 708 Japanujo.

Junaj partoprenantoj de la 32a Hispana Kongreso de Esperanto, en Vigo.



"Rondo Harmonia"

Hispanaj novaĵoj

Okaze de la ĉijara nacia kongreso hispana en Vigo, la tiea landa sekcio de TEJO, HEJS, havis bonegan eblecon kunveni sian anaron; post prezentado de la ĉeestantaj estraranoj s-ro José Fariñas, la prezidanto, klarigis, kio estas HEJS, kaj informis pri TEJO ĝenerale.

Certe interesa ne nur por hispanoj estos la fakto, ke post sukcesaj 1a kaj 2a SEMED (seminarioj mediteraneaj), kiuj ambaŭ okazis en Greklando, nun la hispanoj akceptis la inviton de la Mezorianta Komisiono de TEJO, en 1973 aranĝi 3an SEMED en Hispanujo. Estas akceptita kiel loko la suda urbo Alicante, kies junaj esperantistoj proponis sin por sindone helpi kaj organizi la seminarion tie.

Pri vera kaj efika kunlaborado de la reprezentantoj de HEJS, problemoj jam traktita dum la pasintjara kongreso, estis diversaj opinioj kaj vigla diskuto; ankaŭ necesis klarigante respondi demandojn rilate la revuon, kies laŭdinda eldonado postulas sufiĉe multe da mono kaj tiel bedaŭrinde devigis plialtigon de la membrokotizo. Tamen substrekendas, ke ne estis iu ajn protesto kontraŭ tio, la propono estis unuanime aprobita, kaj oni deziris plivastigon de la agado laŭ la idealismaj celoj, por kiuj ja fondiĝis la sekcio. Nun oni planas eldonadon de membra adresaro kaj la organizadon de pluraj internaciaj aranĝoj sufiĉe allogaj, similaj al SEMED.

Fine ni rimarkigu la gajan etoson kaj kuniĝon, kiujn plej bone reliefigas la ĉiunoktaj eksterprogramaj festoj kaj la vera kaj sincera amikeco inter la gejunuloj el la plej diversaj regionoj de la lando. Kontaktadreso por HEJS daŭre restas: Barrencalle Barrena 7-1ª, Bilbao 5, Hispanujo.

Informas la Afrika Komisiono de TEJO

La komisiono volas ambicie agadi por enkonduko de Esperanto-kurso en afrikajn radio-staciojn — agadi en tri stadioj: unue informado, due instruado, trie praktikado de la Internacia Lingvo. Laŭ la plano, la kurso estos preparita en la angla, araba, franca, hispana, itala kaj portugala lingvoj kaj ĝin ricevos radio-stacioj tra la tuta Afriko.

ENIGMOJ

La sekvantajn enigmojn, rime verkitajn de s-ino Celia Doerner, prezentas al vi via redaktoro, dankante la aŭtorinon pro ŝia kontribuaĵo. Per ili ni ne nur celas familiarigi vin kun simplaj, sed tre lerte faritaj

versoj, sed ankaŭ igi vin streĉe cerbumi por trovi la respondojn. Se vi tamen ne sukcesas trovi la solvon, vidu la klarigajn notojn, kie vi trovos ilin *renversite* presitaj.

Kelkaj klarigoj en ĉiutaga prozo

1. Mi komenciĝas per sufikso,
Finiĝante per prefikso;
Jen, mi estas renversebla,
Ofte tamen nesolvebla,
Ĉar vi, eĉ min eltrovante,
Ja eraros, respondante.
2. Ĉu vi legas min antaŭen,
Ĉu vi legas malantaŭen,
Mi de l'tempo peco estas,
Sed momenton nur mi restas.
3. Ĉiuj homoj min deziras,
Sed malmultaj min akiras;
Jen, de mi, eĉ renversita,
Estas tuta mond' regita!
4. Spec' mi estas de movado,
Stranga tiu ĉi irado:
Ĉu antaŭen aŭ ĉu male,
Mi progresas tutegele.
5. Kiun nomon ajn dirante,
La solvaĵojn elserĉante,
Jam vi la respondon konas,
Ĉar mi, vidu! ĝin ja donas;
Kaj eĉ ĉia renversado
Efikiĝas sen ŝanĝado.

Jen, mi estas renversebla = Vidu, vi povas renversi min, tio estas, vi povas legi min de la komenco ĝis la fino aŭ de la fino returne al la komenco. Ĉar vi, eĉ min eltrovante, ja eraros respondante = Ĉar eĉ se vi eltrovas min (se vi trovas la solvon), vi, en via respondo, eraros.

Ĉu...ĉu = Tute egale ĉu vi legas min de maldekstre dekstreN, aŭ de dekstre maldekstreN, mi restas parteto de la tempo kaj daŭras nur tre mallonge.

Jen, de mi, eĉ renversita, estas tuta mond' regita! = Tamen mi regas la tutan mondon, eĉ se vi renversas min (t.e. en tiu ĉi kunteksto: eĉ se vi legas min de malantaŭe antaŭeN).

Estas pluraj specoj de movado (kuri, kurbiĝi, gimnastiki, ekkaŭri, salti). Tie ĉi temas pri unu speco de movado. Kiu? Tute egale, ĉu vi legas, la trovotan vorton antaŭeN aŭ malantaŭeN (male), ĝi indikas en ambaŭ kazoj progreson.

Kiun ajn nomon vi diras, kiun ajn solvon (solvaĵon) vi eltrovas (elserĉas), vi jam konas la respondon, ĉar mi jam menciis ĝin. Eĉ se vi renversas la vorton, tio havas nenian efikon, ĉar la vorto restas sen ŝanĝo (la vorto ne ŝanĝiĝas: la renversado efikiĝas (iĝas efika) sen ŝanĝado).

Klarigoj:

angul-et-o: krom la konata signifo, "angulo" povas ankaŭ signifi (PIV, sub 8) "loko en gazeto, regule rezervita por iu fako aŭ rubriko". "Nia anguleto" do estas la malgran-

da spaco, kiun ni disponas en la revuo "Esperanto" por la rubriko "Komenco bona - ĉio bona".

ne-konsci-e: sen intenco, neintence, malgraŭvole. Kiu pekas nekonscie, tiu fakte ne pekas.



FELIĈA GEEDZECO

La sesjara fileto Viĉjo vekigis je la tria horo en la nokto.

"Panjo" — li ĝemis — "mi ne povas dormi; rakontu al mi fabelon".

"Ssst, mia vireto! Baldaŭ via paĉjo venos hejmen, kaj sendube li rakontos fabelon al ni ambaŭ".

EL LA 10 DEVOJ DE LA ESPERANTISTO

5. Kion vi povas lerni nur en unu semajno, ne instruu en unu horo, el malgravaĵoj ne faru regulon, kaj el regulo ne faru malgravaĵon.

Jen tre saĝa kaj atentinda konsilo, kiun multaj iom facilanime neglektas. Ĉar ankaŭ Esperanto havas regulojn, kiujn oni nepre devas strikte observi se oni volas skribi kaj paroli korekte. Ni ne intencas, en la kadro de tiu ĉi rubriko, detale pritrakti la gramatikajn regulojn de la lingvo, ĉar tio ja ne estas la celo de nia *anguleto*.

Same grava estas la admono, ke oni ne faru regulon el malgravaĵo. Se, en la komenco de la historio de Esperanto, pluraj adeptoj de la nova lingvo *ne-konscie* pekis kontraŭ la struktura karaktero de la lingvo, "bakante" kunmetitajn vortojn sen konsideri la principojn de la Esperanta vortfarado, tio ne signifas, ke oni rajtas agi same. Pluraj el tiaj vortoj tiel firme enradikiĝis en la lingvon, ke oni ne plu povas, nek volas, ekstermi ilin.

1. ERARE
2. NUN
3. ORO
4. IRI
5. NOWON

HISTORIO KAJ NUNTEMPO

La fakton, ke UEA estis fondita en 1908 en Ĝenevo, preskaŭ ĉiu scias, sed verŝajne nur malmultaj iam legis la tiamajn statutojn kaj regularojn. Ili troviĝas en la jarlibro 1911. En ĝi oni legas, ke la Asocio konsistis el: "Aktivaj membroj, Esperantiaj entreprenoj, Aprobantoj, Esperantiaj asocioj kaj Honoraj membroj". Ekde la ŝanĝo de la statuto en 1920 la Asocio havas membrojn (nun tiel nomataj asociaj membroj), membrojn-abonantojn (MA), membrojn-subtenantojn (MS), dumvivajn membrojn (DM) kaj honorajn membrojn (HM). Poste aldoniĝis membroj kun jarlibro (MJ) kaj patronaj membroj (Pat.), kaj fine junaj membroj kun jarlibro (J-MJ), junaj membroj-abonantoj (J-MA) kaj membroj-abonantoj kun "Kontakto" (MA-K).

Nun ĉi tie priatentota estas la kategorio MS. En la statuto 1920 — kaj tio ankoraŭ nun samas — MSj estas indikitaj kiel "membroj, kiuj, por helpi al la Asocio, pagas la por ili fiksitan pli altan kotiz-abonon".

Estas klare, ke la financa kaj ekonomia stato de la individuaj membroj de UEA estas malsamaj. Tial jam ekde 1920 la Asocio faras alvokon al tiuj membroj, kiuj estas en pli favoraj cirkonstancoj, ke ili pagu kotizon, kiu estas 50% pli alta, ol la kotizo por mem-

bro-abonanto (MA), kvankam tiu pli alta pago ne donas ian plian rajton.

Ĉu tiu alvoko donis kontentigan rezulton?

Ni vidu la ciferojn, kiuj donas la procentaĵojn de MS kaj DM kompare kun ĉiuj membroj, kiuj ricevas la jarlibron kaj la revuon.

	MS	DM
1922	2,2%	4,0%
1934	8,4	4,3
1951	6,0	4,4
1961	9,0	6,4
1971	4,0	13,9
1972 (1 okt.)	4,4	14,0

El tio montriĝas, ke oni povas respondi la demandon per "jes". Inter 1922 kaj 1971 la procentaĵoj de la membroj kiuj pretis pagi kotizon de MS, ĉiam restis inter 2 kaj 9%. Post la jaro 1961 la procentaĵo de MSj falis, kion klarigas la granda kresko de DMj.

Sed oni povas respondi ankaŭ "ne" al la farita demando, ĉar certe ne ĉiu, al kiu finance eblas pagi la kotizon por MS, fariĝis MS.

Temo ligita kun la supra estas, ke ekde 1955 pro la inflacio kaj granda kresko de kostoj en Nederlando la Komitato estis devigata preskaŭ ĉiun trian jaron fiksi pli altajn kotizojn. Tia tria jaro ĉi-foje estus 1973, sed feliĉe ne necesis, ke la Estraro proponu plialtigon de la kotizoj por 1973. Ili restas same kiel en la jaroj 1970, 1971 kaj 1972, kaj do 30 gld. por MA kaj 45 gld. por MS.

Baldaŭ jam estos tempo por pagi la kotizon por la jaro 1973. Al ĉiuj, kiuj en 1972 pagis la kotizon MA kaj havas financan — kaj ankaŭ transpagan — eblecon elspezi iom pli por sia membreco, ni petas pripeni la eblecon fariĝi MS en 1973.

Bonvolu tiurilate preni en konsideron, ke dum kvin jardekoj UEA havas ne devigajn sed tute libervolajn malsamajn kotizojn por siaj membroj. Ekzistas aliaj organizaĵoj, kiuj havas kotizojn, kiuj malsamas inter si kaj kiuj en tiel nomataj "riĉaj landoj" estas pli altaj ol en tiel nomataj "malriĉaj landoj". Sed fakto estas, ke ankaŭ en riĉaj landoj loĝas malriĉaj homoj kaj ke ankaŭ inter ili troviĝas individuaj membroj de UEA. Tial, miaopinie, estas plej bone lasi la sistemon, kiel ĝi estas ekde 1920.

La Estraro de UEA esperas, ke ĝi povos noti en la sekvontaj monatoj pluan kreskon de la nombro de MSj. Pro la faktoj ke la nederlanda poŝto denove altigis la afrankojn ekde 1972-09-01 kaj ke ankaŭ aliaj kostoj altiĝis, la Estraro devus en 1973 zorge esplori, ĉu ĝi proponu plialtigon de la kotizoj ekde 1974. Kontentiga kresko de la nombro de MS, kun ĝenerala kresko de la membraro en aliaj kategorioj, povos grave influi tiun pritraktadon. Se plialtigo eĉ por la jaro 1974 ne estos necesa, tio ĝojigos kaj la Estraron kaj certe ĉiujn membrojn.

E. J. Woessink,
estrarano pri financo

ESPERANTO EN RADIO

ĈEĤOSLOVAKUJO. Nova kurso de Esperanto por progresintoj estas elsendata de la stacio Bratislava. La unua leciono okazis la 5an de septembro je 16.45 GMT kaj estis ripetita la 7an de septembro je 16.20 GMT; aliaj lecionoj daŭre okazos marde kaj ĵaŭde laŭ tiu programo. Ondoj uzataj: 68.84 Mcs (modulita frekvenco). La stacio estas aŭdebla nur en la lando mem kaj en alilandaj najbaraj provincoj.

USONO. La kurso de s-ino Wills estas denove dissendata dum la studjaro 1972-73 kvin tagojn ĉiusemajne per la stacioj WOSU en Columbus (Ohio) kaj KPBS en Portland (Oregon). Tiu kurso konsistanta el 150 kvin-minutaj sonbendoj estas havebla por angle-parolantaj landoj kontraŭ abonkotizo. Ĉiuj informoj estas haveblaj ĉe s-ino Robert L. Wills, 94 West Riverglen Drive, Worthington, Ohio 43085, Usono.

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75016 Paris, Francujo. Por aliaj detaloj vidu la oktobran numeron.

NOTO: La stacioj Bern, Pekino, Roma, Warszawa regule sendas senpagan programon de siaj elsendoj al petantoj.



OFICIALA INFORMILO

N-ro 461, 1 oktobro 1972

FINNA ĈEFDELEGITO TRANSLOĜIGIS

La ĉefdelegito de UEA por Finnlando, s-ro J. Jäntti, havas novan adreson: Esperantotie 4, SF-02220 Iirislahti, Finnlando. Pĝk 401770-1. Finnaj membroj bonvolu bone noti!

VENEZUELO DENOVE HAVAS PERANTON

Post kelkmonata vakado de la ofico, kiel nova Peranto de UEA por Venezuelo estas nomita prof. J.E. Bachrich, Apartado 3833, Caracas, Venezuelo. Tiel la nombro de landaj oficejoj de UEA en Suda kaj Centra Ameriko denove atingis 8.

NOVAJ KOTIZOJ POR ISRAELO

Pro kurzoŝanĝo necesis ĝustigi la kotizojn de UEA en israelaj pundoj por 1973. Ili estas de nun: MJ 20; MA/MA-K 40; MS 60; J-MJ 10; J-MA/SA 30.

Abono al "Kontakto" kostas £11; abono al "La Monda Lingvo-Problemo": £34.



NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Andersson, Lennart, Smedjebacken, Svedujo.
Andersson, s-ino Nelly, Smedjebacken, Svedujo.
Becker, s-ino Maria, Blieskastel, F.R. Germanujo.
Hiltunen, Yrjö, Kouvola, Finnlando.
Kästli, Hans, Wil, Svislando.
Vilagran, M. Llorens, Barcelona, Hispanujo.
Walz, Oliver, Zweibrücken, F.R. Germanujo.

NOVAJ MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1972

274 C.A. Wutke, Brazilo. 275 M.A. Carver, Nov-Zelando. 276 D. Ellard, Svedujo.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1973-01-15 neniuj membroj protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Belgujo: Charles Norga, FD Andrimont; Jozef Muys, D Bornem; Clément Tholet, FD Herstal; Eddie Frederickx, FD Merksem; Raimond Steenhout, FD Ninove; s-ino Simonne Fichet Jacquet, D Ransart;
Brazilo: Sylla Chaves, FD Rio de Janeiro. **Britujo:** Hilary Chapman, FD Bangor; Colin Quayle, FD Birmingham; Albert H. Boddy, D Chippenham; John Murray, D kaj FD Darlington; Charles H.S. Donald, FD Glasgow; William E. Hopkins, D kaj FD Newport; Arthur Jackson, D kaj FD Pudsey; Clarence D. Bills, D kaj FD Tavistock. **Francujo:** f-ino Claude S. Nour-

mont, FD Melun; Raymond Pons, D Pamiers. **F.R. Germanujo:** Ulrich Hoffmann, FD Berlin; Karl Bernhard, D kaj FD Ludwigshafen/Rhein. **Grekujo:** Adamantia Sakellaropulu, VD Athine. **Hungarujo:** Sitosi Hukaya, JD Budapest. **Italujo:** Vito de Benedetto, D kaj FD Lecce. **Nederlando:** Kees Ruig, FD Amstelveen. **Pollando:** Helena Halfar, FD Opole. **Svislando:** Andres Bickel, JD Genève. **Sovetunio:** Boris V. Tokarev, FD Moskva. **Usono:** William W. Glenny, D Beverly Hills; Robert Morey, FD Columbus; Henriko Baksik, D kaj FD Detroit; Elwin Reed, FD Los Angeles; Armin F. Doneis, FD Pharr; f-ino Dorothy A. Hughlett, FD St. Petersburg; John H. Fulton, D kaj FD Yucaipa.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1972 — pro adresŝanĝoj kaj aliaj kaŭzoj)

Belgujo: Soumagne. **Britujo:** Aberdeen, Flitwick. **Francujo:** Aix-en-Provence (FD juro), Fontainebleau, Melun (FD studentaj aferoj). **Italujo:** Roma (FD ekonomio), Laveno. **Kanado:** Sherbrooke. **Nederlando:** Leeuwarden (FD laktoproduktoj). **Nov-Zelando:** Devonport (FD religio: unitarismo). **Svislando:** Rapperswil. **Usono:** Berkeley, Charleston, Greenbelt, Jersey City, Los Angeles (FD kemio, PTT), Oakland, Rosemead, San Marino, Washington (FD agrokulturo, ĵurnalismo).

DONACOJ 1972 (Gld.)

Ĝenerala kaso: Belgujo: I. Durwael, 1,14. Hispanujo: Salvador Arnella, 50,80. Nederlando: f-ino J. Flach, 10,—. Norvegujo: Lauge Madsen, 39,12. Pollando: H. Paruzel, 2,52. Svedujo: Sven Möllestad, 13,30. Usono: s-ino Cecelia Peterson, 318,87. Anonima, 1,91. Sumo ĝisnuna: 1 010,67.


Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo. Universala Esperanto-Asocio

KOREKTOJ

Sub la rubriko "Ne plu validas" aperis en la juli-aŭgusta numero de "Esperanto" la informo, ke oni forstreku la delegiton de Sarajevo, Jugoslavio. La delegito restas, sed oni bonvolu forstreki la junular-delegiton. Ni pardonpetas.

El la Lerneja Bulteno n-ro 24 en la oktobra *Esperanto* erare elfalis unu linio. Bonvolu enmeti inter la 15a kaj 16a linioj en la maldekstra kolono de la paĝo 175 jenajn vortojn: "Ĝenerala lingvistiko" (I. Szerdahelyi, Budapeŝto,

KALEN- DARO



Decembro

- 10 Tago de Homaj Rajtoj
- 15 Zamenhof-Tago (LLZ naskiĝis en 1859)
- 15 Tago de la Esperanta Libro
- 26-5/1 16a esperantista skiferio, Adelboden, Svis.
- 27-3/1 16a int. semin. junulara, Darmstadt, FRG
- 28-2/1 2a vintra esp. ferio, Budapeŝto, Hungarujo
- 31 Kotizoj de Universala Kongreso altiĝas

Januaro

- 4-8 38a nov-zelanda kongreso, Masterton

Februaro

- 1-6 Vintra semajno, Pamporovo, Bulgarujo
- 17-24 Linza esp. skisemajno, Werfenweng/Salzburg, Aŭstrujo
- 19-25 Semajno de Internacia Amikeco

Marto

- 10 Esp-a renkont. ĉe la Foiro, Leipzig, GDR.
- 31 Limdato de la Belartaj Konkursoj
- 31 Kotizoj de Universala Kongreso altiĝas

Aprilo

- 14 Zamenhof mortis en 1917
- 28-1/5 11a Markola kongreso, Folkestone, Britujo
- 29 Limdato de Internacia Ekzameno

Majo

- 12-18 25a int. fervojista kong., Aarhus, Danlando

TURISMA KALENDARO PREPARATA

Turisma Servo de TEJO kaj Pola Esperanto-Junularo eldonos *Turisman Kalendaron* por la jaro 1973. Ĝi aperos en sep lingvoj, kaj krom la sciigoj pri Esperanto kaj TEJO ĝi enhavos informojn pri ĉiuj aranĝoj aplikantaj Esperanton, kiuj okazos en 1973. Ĝi servos kiel gvidilo de turismaj Esperanto-aranĝoj. Ĝi estos bona famigilo de ili inter neesperantistoj kaj samtempe bona rimedo por disvastigo de Esperanto. Ĝi helpas enkonduki Esperanton en turismon kaj ebligas kunlaboron inter TEJO kaj turismaj oficejoj. *Ĝi plenumos sian rolon nur se ĝi estos kompleta kaj ekzakta.*

Tial ni turnas nin al ĉiuj, precipe al la organizantoj de Esperanto-aranĝoj, ke oni sciigu al ni la detalojn pri la planataj aranĝoj. La informo enhavu la nomon de la aranĝo, lokon, detalajn datojn, temon aŭ programon, la nomon de la organizanto kaj korespondadreson kaj la partoprenkondiĉojn (prezon).

Bonvenaj estos ankaŭ la raportoj pri la aranĝoj okazintaj en 1972, prefere akompanataj ankaŭ de fotoj, kiuj estos ilustra ornamo de la kalendaro. Ni atendas vian tre baldaŭan reagon.

Turisma Servo de TEJO
Pola Esperanto-Junularo
(str. Kujawska 24, Sopot, Pollando)

Redakcia noto:

Proponon fondi Vojaĝinforman Servon de UEA, kiu eldonus turisman kalendaron, ni publikigis en *Esperanto*, 1971, n-ro 792, p. 212 (proponinto: s-ro P.V. Bagger, Danlando). Sekvis favoraj reagoj de pluraj legantoj, sed la manko de homaj kaj financaj rimedoj ĝis nun ne permesis ion efektiviĝi en tiu direkto.

La Turisma Kalendaro de TEJO/PEJ espereble plenumos intertempe la bezonon.

ANONCETOJ

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,50 gld. (1 int. respond-kupono). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas sole nur la anoncantoj.

Kelkaj geesperantistoj deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj pri ĉiuj temoj. Skribu al: f-ino Seija Yrjölä, Viipurintie 23, Hämeenlinna, Finnlando.

Serĉataj: Esperanto-poŝtstampoj klare legeblaj sur kovertoj aŭ poŝtkartoj de kongresoj, renkontiĝoj ktp. Mi atendas vian sendaĵon: s-ro J. Kuijpers, Lombardkade 85 b, Rotterdam-3001, Nederlando.

Korespondado: 15 gimnazianoj, 14- ĝis 16-jaraj, kun samaĝaj gejunuloj el Germanujo, Svedujo, Francujo kaj aliaj landoj. D. Williams, 9, Oulton Avenue, Chester, CH2 1QY, Britujo.

Korespondu neŭroze kun F. H. Sumner, 1625 NW 14th ST., Corvallis, Oregon 97330, Usono.

Korespondant(in)ojn serĉas por siaj ĉiuaĝaj diversregionaj lernant(in)oj: s-ro Pierre Delaire, B.P. 901, F-45010 Orléans, Francujo. Ne respondos sed transdonos la petojn. Indiku aĝon, profesion ktp.

La Eta Princo de Saint-Exupéry estas ĉarma 102-paĝa ilustrita libro "por infanoj", verdire kun *altnivela filozofio!* Mendu ĝin ĉe la tradukinto: Pierre Delaire, B.P. 901, F-45010 Orléans, Francujo. Poŝta ĝirkonto: 271-69 La Source. Prezo: 28 fr. fr., aŭ frankite.

Universala Invalida Esperanto-Asocio, Box 5, Strib, DK 5500 Middelfart, Danlando, deziras kontakti ĉiujn invalidojn kaj kriplulojn de la tuta mondo. Skribu por nia bulteno.

Ferioj en Insulo Madeira. En loko la plej ŝatata, apud la maro, esperantistino luigas du ĉambrojn, banejojn, inkluzive de matenmanĝo. Skribu al Eliza Caetano, Estrada Monumental 244-7° Dto, Caixa 14, Funchal, Madeira, Portugalujo.


Naskiĝis 1972-09-04 Silvia Pilger, Leekerhoek 26, Lelystad, Nederlando.

La dolĉa Franclando estu en ĉiu esperantista biblioteko! Romantika, riĉa kaj ĉarma 128-paĝa luksa libro kun 69 ilustraĵoj. Broŝurita: 28 fr. fr. afr. aŭ: 38 fr. fr., bindita. Mendu ĉe la aŭtoro: Pierre Delaire, B.P. 901, F-45010 Orléans, Francujo. Poŝta ĝirkonto: 271-69 La Source.

AŬTOROJ-ELDONISTOJ!

Ĉu vi serĉas metodon por eldoni malmultekoste verkon por limigita publiko? Eble UEA scias solvi vian problemon! Ekzemple: fakulo havas bone tajpitan manuskripton 50-paĝan de teknika terminaro, kun desegnaĵoj, formularoj, tabeloj ktp. Li taksas, ke ekzistas nur ĉirkaŭ 50 potencialaj aĉetontoj. Presigi 50 ekzemplerojn plumbe aŭ ofsete estus ege multekoste. Mimeografado estus malfacila, temporaba kaj ne tre bonkvalita. Sed li sendas la pretan tajpaĵon al UEA, kun desegnaĵoj ĝuste surgluitaj, kaj ricevas *poŝtrevene* 50 perfektajn kopiojn de ĉiu paĝo, sur ambaŭ flankoj de normala blanka aŭ kolora papero. La kosto? Nur 250,— guldonoj, t.e. po 5,— gld. por ĉiu kompleto — plus sendokostoj. La Centra Oficejo de UEA povas kserografie reprodukti en malgranda kvanto vian poemaron, terminaron, skizalbumon, disertacion aŭ alian verkon je prezo pli favora, en rilato al la kvalito, ol per iu ajn alia metodo. Ĝi ankaŭ povas fotografie malgrandigi, kunmeti la paĝojn kaj plaste bindi la kompletojn. . . ĉio je modestaj prezoj. Petu oferton ĉe UEA!

LA GLUMARKO DE LA JARO



1972

Internacia
Libro - Jaro


Bela dukolora (verda-nigra) marko por la
Internacia Libro-Jaro, proklamita de Unesco.

Prezo: po 0,40 gld. (por Nederlando 0,46)
por folio de 16 markoj. Sendokostoj 10%.

LIBROSERVO DE UEA

Por la mondpaco! Kristo loĝas en mia koro! Mondpaco pli rapide ekestos, kiam ĉiu homo sur la tero ĉiutage ĵuros: neniam mi volas esti murdisto aŭ ŝtelisto, sed kontraŭe ĉiutage vivi por fariĝi amata de la tuthomaro.

Mi kore antaŭdankas al ĉiuj samideanoj el ĉiuj religioj, kiuj bonvolos skribi al mi, ke tiuj vortoj ankaŭ por ili estas valoraj. N. Droz, Mondpaca Movado, Poŝtokesto 212, CH-8047 Zuriko, Svislando.



ENTUZIASMIGE RAPIDA PROGRESO

eblas per tute nova,

COMPLETE SEVEN-DAY ESPERANTO COURSE FOR INTERNATIONAL CORRESPONDENCE (247p, 28cm, 1971)

Kial oni deziras malŝpari sian tempon sen ĉi tiu kurso? (Bonvolu legi recenzon en la maja numero de "Esperanto", 1972.)

Fidinda kurso kun tute nova, ekspresa instrumetodo celas tuj ebligi internacian korespondadon. Krome, ĝi estas multe malsama, ol aliaj, pri la jenaj: 1) Gramatikaj reguloj, klarigitaj simple kaj nombritaj por tuja referenco; 2) Mnemonikaj (memorigaj) principoj de asociado kaj komparado, aplikitaj tra la libro; 3) "La Vortfinaja Tabelo pri Fundamentaj Vortoj", originale kontribuita de la aŭtoro; 4) Informmateriaĵoj, gramatikaj aldonaĵoj kaj multaj aliaj.

Demandu kaj mendu ĉe:

Universala Esperanto-Asocio,
Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.
Brita Esperantista Asocio,
140 Holland Park Avenue, London W11, Britujo.
Green Star Trading Company (eldonejo),
P.O. Box 8916, Portland, Oregon 97208, Usono.

Abonu al la fondita en 1964

BIBLIA REVUO

Trimonata internacia gazeto pri Bibliaj kaj Orientaj Studoj

(ordinara jarabono: 6 usonaj dolaroj)

Petu senpagan ekzempleron kaj diskonigu ĝin.

Varbu membrojn al la fondita en 1967

I. A. B. O.

"Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj"

faka kunlaboranta asocio de UEA

(aliĝo simpla 2 usonaj dolaroj; ordinara 6; subtenanta 50; dumviva 300)

Donu vian apogon al la fondita en 1968

EKUMENA BIBLIO-FONDAĴO

por ebligi la eldonon de komuna traduko en Esperanto de la Sanktaj Skriboj

Sendu viajn abonprezojn, kotizojn kaj donacojn al Administracio de Biblia Revuo (Pĉk. 8/17852), Piazza Duomo 4, I 48100 Ravenna (Italujo)

Dezirkartoj el la dolĉa Franclando

Por esprimi viajn bondezirojn laŭ ĉarma maniero, uzu la esperantistajn *tre originalajn* kartojn ĵus eldonitajn de la nacia centro "Espéranto-Office" en Orléans, Francujo, *profite por la senpaga instruado de esperanto*.

Formato: 12 x 15,5 cm, duoble, kun 4 *artaj* diversaj fotoj delikate reproduktitaj, kun ampleksaj bildoklarigoj france kaj esperante.

1. *Mistera arbaro kun ensorĉa rivero.*
2. *Bretona belulino folklore vestita.*
3. *Marĉejo romantika kun pajlokovrita domo kaj anasetoj naĝantaj.*
4. *Bizanca mozaiko unika en Franclando.*

Tiuj dezirkartoj, sur kartono imitanta tolon, estas vere distingindaj kaj samtempe gajaj.

Prezo por 8 karto: 18,25 fr. fr., aŭfrankite. Por 12 karto: 25 fr. fr. Por 20 karto: 35 fr. fr. Por 50 karto: 75 fr. fr.

La mencio "Korajn bondezirojn!" estas presita en 12 lingvoj sur intermetita folio por korespondo. Taŭga koverto aldonita.

MENDU TUJ HODIAŬ! Vin mirigos la beleco de tiuj karto, kiuj ja ĉarmos viajn amikojn.

Ne forgesu indiki la kvanton, kiun vi deziras por ĉiu numero (1, 2, 3, 4)!

Sendu la mendon kun la mono al: s-ro Pierre Delaire, B.P. 901, F-45010 Orléans, Francujo. Poŝta ĝirkonto: 271-69 La Source.

El Popola Ĉinio

Esperanta Monata Ilustrita
Specimeno akirebla senpage

ABONTARIFO: 1 jaro £0,50 Kan.\$2,00 5,— gld.
2 jaroj £0,75 Kan.\$3,00 7,50 gld.
3 jaroj £1,00 Kan.\$4,00 10,— gld.

ABONU: Ĉe niaj perantoj en diversaj landoj
aŭ rekte ĉe la Libroservo de Ĉina Esperanto-
Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Ĉiu abonanto por la jaro 1973, kiu
faros abonon antaŭ la 31-a de la
venonta januaro, ricevos belan
esperantan bild-
kalendaron.



JUVELOJ DE LA KONVERSACIA ARTO

Okaze de la 57a Universala Kongreso en Portland, mi sukcesis surbendigi kelkajn el la neformalaj konversacioj, kiuj kreiĝas tiel abunde dum kongresoj. Ili estos utilaj al vi por internaciigi vian prononcon. Krom tio, ili estas tre interesaj. Ni vendas kelkajn el ili je speciala enkonduka prezo: \$ 4, inkluzive de aĉroŝta sendkosto. Ili daŭras 30 minutojn je unu flanko, do 60 minutojn entute. Ili estas en du formatoj: kaseto, aŭ bobeno kun diametro de 13 cm. Nepre indiku la formaton kaj la numeron; ankaŭ indiku, ĉu via maŝino estas stereofona aŭ monofona.

72-1:

Petro De Smedt kaj William Auld,
B. Popović kaj Ralph Lewin.

72-2:

Emilija Lapenna kaj Victor Sadler,
Ada Fighiera-Sikorska, Stojan Djoudjeff kaj
Duncan Charters.

72-3:

Harry Holmes kaj Nora Holmes,
Mikuláš Nevan kaj Jaroslava Nevan.

Tiuj ĉi sonbendoj estas speciale klare surbendigitaj.
Mendu rekte de:

Jim Deer, 12946 NE Hancock, Portland,
Oregon 97230, Usono.

ABZ de Amo



Post intensa tri-jara laboro ni kun fiero povas prezenti al vi unu el la plej unikaj verkoj iam eldonitaj en Esperanto.

*Temas pri la plej vendata erotika enciklopedio en Danlando —
ABZ de Amo de la psikologoj Inge kaj Sten Hegeler.*



Prezo: 72,50 danaj kronoj — 33,78 guldenoj.

Eldonejo TK
Hjortespringparken 60
DK-2730 Herlev

Poŝtĉekkonto dana: 7 95 58
Poŝtĉekkonto germana: Hamburg 36 17
Poŝtĉekkonto nederlanda: 1806731